

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №1



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2021. №1 (307)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Sergio Pokrovskij

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, sezonoj@yahoo.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2021

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 33 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (3000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (900 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (600 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2021, №1 (307).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 31 марта 2021 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3

Intervjuo..... 5

Paweł Fischer-Kotowski. Renato Corsetti: La movado elvenos el ĉi tiu periodo pli rezistokapabla ol antaŭe (Intervjuo kun Renato Corsetti)	6
--	---

Eventoj..... 12

Sukcesa agado de UEA ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.....	13
Nova kunordiganto de la Afrika komisiono de UEA	14
Hibride en Lietzensee	15
AlKo. Membrostatistiko de UEA.....	16
Donacoj al la Ĝenerala Kaso de UEA en 2020 fluis abunde	17
Guilherme Fians, Orlando Raola. Alvoko por la 43a Esperantologia Konferenco	18
IJK 2022 okazos en Nederlando.....	18
Retoso 2021: De junuloj kaj por junuloj	19
Pri ne-oficialaj seks-neŭtralaj pronomoj.....	19
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Vilmos Benczik forpasis	20
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Viktor Kloĉkov ne plu vivas.....	21
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Irena Alijoŝiūtė forpasis	21
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Funebraj notoj	22

Tribuno..... 23

Mesaĝo de UEA okaze de Internacia Virina Tago.....	24
Internacia Tago de Virinoj 2021	24
Manuela Blanco. La Oka de Marto postulas interkulturan edukadon	25
Stanislav Belov. Nia mondo disfalas.....	26
Survoje al dua senkongresa jaro	31
Pandemia kurso de la Monda San-Organizaĵo	31

Arkivo..... 32

Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2021	33
Letero de N. Ĥoĥlov al J. Baghy (Zagrebo, la 11an de Jan. 1923)	35
Aleksander Korĵenkov. Notoj de la editoro	39

Kulturo..... 40

Boris Pasternak. Doktoro Ĵivago: Fragmentoj (Trad. Aleksander Korĵenkov) ...	41
--	----

Paulo Sérgio Viana. La domenisto	69
Hector Hodler: Pacisma sinteno ĉe la fondinto de UEA	73
Julian Modest. La inundo	74
Aleksander Korĵenkov. Tri jardekoj da libroeldonado	77
Miguel Fernández. Omaĝe al Federico García Lorca kaj Fernando de Diego	81
Probal Daŝgupto. Metioj kaj krestomatioj (Recenzo: <i>Baza literatura krestomatio</i>)	92
Belartaj konkursoj de UEA: Novaj adreso kaj limdato	101
Wolfgang Kirschstein. Eblas aplaŭdi dumane (Recenzo: Sten Johansson. <i>Sesdek ok; Ne eblas aplaŭdi unumane</i>)	102
Literatura konkurso Grabowski por gejunuloj	104
Carlo Minnaja. Io devas okazi (Recenzo: Miĥail Korotkov. <i>Io devas okazi</i>)	105
Valentin Melnikov. Post multaj jaroj... (Recenzo: Stevan Živanović. <i>La sonorilo de Bled</i>)	106
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako</i> , 2020, №39 (Oktobro)	108
Ekis la 52a jarkolekto de <i>Literatura Foiro</i>	108
AIKo. <i>Unesko-Kuriero</i> : Kontraŭ ŝakrado de kulturaĵoj	109
Biblioteka Apogo Bachrich: alvoko 2021	110
Ricevitaj gazetoj	110
Flo Martorell. Nova muzikvideo de BaRok-Projekto	111
Bjalistoka Literatura Konkurso 2020	111
<i>Verda stelo kaj roza triangulo</i> : Specifa antologio	112
José Antonio del Barrio. Nova bitlibro okaze de la jubileo de Antonio Marco Botella	113
Ni vivas malgraŭ ĉio	113
La Jaro de Dante: Kunlaboro kun la "Casa di Dante"	114
AIKo. <i>La Komunista Manifesto</i> : Ne senpaga oferto	114

Mozaiko	115
Przemysław Wierzbowski. Pola paska babao	116
Stanislav Belov. Ridu kune ni!	118
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	119
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	120

Sur la kovropaĝo, konforme al la nuna nord-hemisfera sezono, estas printempa foto de la Moskva esperantisto Aleksej Salomatov. Ni deziras serenan printempon al la norduloj kaj agrablan aŭtunon al la suduloj. Atentu, ke niajn somerajn/vintrajn bondezirojn ricevos nur tiuj legantoj, kiuj reabonos la *Ondon* por 2021.

Intervjuo



La 29an de marto sian 80-jariĝon festis Renato Corsetti, eble la plej aktiva esperantisto de la du lastaj jardekoj. Ni gratulas lin okaze de la jubileo kaj deziras al li sanon kaj plian kaj pluan aktivadon!

Renato Corsetti: La movado elvenos el ĉi tiu periodo pli rezistokapabla ol antaŭe

Vi aktivas por la Esperanto-movado jam pli ol duonjarcenton. Kiam vi eklernis la lingvon, la mondo estis tute alia: la unua homo sendita en la kosmon, flugo al la luno, seksa revolucio kaj amasaj protestoj kontraŭ la usona-vjetnama milito. Ankaŭ en Esperantujo: UEA kun pli ol 30 mil membroj (el kiuj pli ol sep mil individuaj membroj) estis gvidata de Ivo Lapenna, al la unua azia UK (50a UK, Tokio, 1965) aliĝis pli ol 1700 personoj. Jen mondo de espero, kie ĉio eblas, ankaŭ la fina venko.

Vi pravas. Esperanto ne vivas en vakuo, sed ĝi estas firme ligita kun la ĉirkaŭa socio. Ĉu ĝi ne naskiĝis pro la pogromoj en la Ruslanda imperio? Ĉu ĝi ne disvastiĝis en la kadro de la esperoj pri pli bona mondo de duono de la tiama socio, dum la alia duono pluportis la naciismon de tiu jarcento al la kulmino de la Unua Mondmilito? Ĉu ĝi ne organiziĝis samtempe kun la pac-movado kaj prosperis sur la ondoj de fido al la scienco, kiu savos la mondon?

Kiam mi estis juna, Eŭropo travivis periodon de grandaj esperoj pri la estonteco kaj de grandaj sociaj ŝanĝiĝoj. Ekzemple, mi apartenas al la unua generacio de filoj de laboristoj, kiuj vizitis la superan mez-lernejon. Ne forgesu, ke tiam Eŭropo travivis periodon de rekonstruado materia kaj spirita post la Dua Mondmilito.

En tiu kadro, en la kvindekaj jaroj oni trovis la energion en la esperantistoj, kiuj estis parto de la ĉirkaŭa sampensa socio, por rekonstrui la Esperanto-movadon. Ĉio ŝajnis ebla, kaj post la agnosko de Esperanto fare de Unesko en Montevideo komence de la 1950aj jaroj, multaj pensis, ke la fina venko jam venis. Lapenna estis granda gvidanto, sed ankaŭ la gvidatoj estis grandaj kaj pensis, ke ili povas vere influi la mondon. Neniu vere komprenis tiam en Okcidenta Eŭropo tion, kio estis ekokazanta, alivorte, ke la sinnomanta libera mondo eniras la usonan imperion, kio estas la fino de neŭtrala lingvo antaŭ la lingvo de la imperio, la angla. Sed tio fakte okazis. La agnosko de Unesko restis unu el tiuj belaj ideoj, pri kiu la libera mondo ridetis dum ĝi okupiĝis vere pri la lernado de la angla kaj la milionoj da subskriboj prezentitaj al UN estis trankvile ignorataj. Mi ekaktivis en la 1960aj

jaroj, kaj mi kaptis la emociojn de tiu periodo. Mi mem vidis la maljunulinojn en la unua vico plori dum festparoladoj de Lapenna. Mi mem spertis la tiamajn esperojn, la senton pri progreso de la movado. Kiam UEA aĉetis la unuan kopi-maŝinon por fari fotokopiojn, tio fariĝis la ĉefa novaĵo en la dissendo de la tiama itala radio en Esperanto. Tiam modernan movadon neniu antaŭe pensis ebla.

Mi travivis tuj poste la junularajn ribelojn kaj la renoviĝintajn esperojn de la tiamaj gejunuloj pri plia libereco en la socio kaj en la mondo. La tiama TEJO estis parto de la pli ĝenerala junulara movado kaj kun entuziasmo transprenis UEA-n de Lapenna, kaj pensis, ke per la novaj ideoj kaj la nova pli libera socia ordo ĝi povas porti la movadon antaŭen. Cetere, tiam la malkoloniiga procedo progresis, kaj en TEJO naskiĝis la ideoj pri Esperanto en Afriko, kaj intertempe la venko de Vjetnamujo kontraŭ Usono ŝajnis la fino de imperiismo.

Ho ve! Ni ne komprenis tiam, ke la sociaj reformoj, la seksa libereco kaj similaj gajnoj de la junularaj ribeloj estis fakte nur supraĵaj aferoj, kaj ke la imperio intertempe firmigas sian regon kaj sian lingvon kaj kompatas idealistojn kiel nin.

La fina bato por UEA kaj la movado estis la kolapso de la Sovetunia sistemo. Post la morto de Stalin Esperanto prosperis en Orienta Eŭropo kaj en Soveta Unio, kaj la tiea movado ricevis ŝtatan helpon, kiun ĝi parte misuzis. Cetere, ideo Esperanto kongruis kun la tiamaj kaj tieaj teoriaj pensoj pri internaciismo. Neniu en la esperantista mondo komprenis, kian grandan baton por Esperanto portas la fino de la socialisma "tendaro".



Ĉu vi vidis tian Renaton en la epoko, kiam li estis komencanto en Esperanto?

Kelkaj kaj en la Okcidento kaj en la Oriento eĉ pensis, ke en la novaj kondiĉoj de libereco Esperanto povos multe disvolviĝi. Ili estis viktimoj de la retoriko pri libereco per kiu la imperio kaŝis siajn celojn vastiĝi al alia mondoparto. La rezultoj estas antaŭ la okuloj de ĉiuj: ne plu lernu la lingvon de la antaŭa imperio sed tiun de la nova, kaj Esperanto estas stultaĵo de mal-realistoj.

Mi komprenas, ke mi estas rakontanta mian tutan vivon. Mi provu resumi la aferon per unu frazo: la generacio de Lapenna konstruis fortan movadon, mia generacio malkonstruis ĝin aŭ almenaŭ ne komprenis, ke la malkonstruado estas okazanta, kaj ke ni povas fari nenion kontraŭ ĝi.

Mi aldonu ankoraŭ, tamen, unu aferon: en la 1960aj jaroj la esperoj pri granda kaj forta Eŭropo, kun apartaj trajtoj kaj kuntenanta socialismon kaj liberecon, estis grandaj kaj ŝajnis, ke Esperanto povos esti parto de tiu nova Paradizo. Vi ĉiuj povas konstati tion, kio okazis: Eŭropo estas periferia parto de la imperio kaj rezignus pri la lingvo de la imperio favore al Esperanto, nur se Usono ne ordonos tion al ĝi.

Ĉu la fervoro kaj esperoj de tiu periodo estas hodiaŭ ankoraŭ vivigeblaj? Se jes, kiel?

Pri Eŭropo kaj ĝenerale la Okcidento mi ne scias. Dum regos la nokto de ekstrema libermerkatismo, la homoj estas gvidataj for de ĉio, kio demandosignas la sistemon, eĉ de la problemoj pri pluekzisto de la mondo: ĉu ni pluproduktu senutilaĵojn kaj detruu nian planedon? Jes, respondas la sistemo kaj pagas ĵurnalistojn kaj reklamistojn, kiuj konvinkas la popolon, ke tio estas la ĝusta respondo.

Kaj Esperanto demandosignas la sistemon de potencorilatoj en la mondo. Aliflanke mi vidas grandajn esperojn pri pliboniĝo de la viv-situacio en Afriko kaj Azio, aparte Ĉinujo, inter la homoj ĝenerale kaj sekve ankaŭ inter la esperantistoj. Se la ĉinaj esperantistoj decidus uzi la influon de la ĉina registaro favore al Esperanto, tio eble povus porti progreson. Mi ne vidas, kiu alia regiono de la mondo povas transpreni la torĉon de Eŭropo. Sed, atentu, tio postulas, ke ĉinaj esperantistoj forlasu sian pozicion de nur utiligado de Esperanto.

Vi insistas pri la informado. Se mi bone komprenas, laŭ vi la Esperanto-movado devus plene sin dediĉi al la informa agado, eĉ je la prezo de aliaj aktivadoj. Bonvolu klarigi en kelkaj frazoj kiel organizi tiun agadon, kiel devus aspekti perfekta Esperanto-informado?

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Internacia **TAGO** de la **GEPATRA LINGVO**

21-a de februaro 2021



Per la uzo de la internacia lingvo
Esperanto oni respektas la
lingvan kaj kulturajn diversecon
de ĉiu homo.

Pri lingvoj: www.lingvo.info
Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org



En jaro senpandemia la rubriko “Eventoj” estus ĉirkaŭ tridekpaĝa kun ilustritaj raportoj pli pluraj jar-ŝanĝaj kaj Zamenhof-tagaj renkontiĝoj. Sed en la unua ĉi-jara “Ondo”, la primovada rubriko estas nur dekpaĝa, kaj tri paĝojn en ĝi plenigas nekrologoj.

Membrostatistiko de UEA

Laŭ la publikigita statistiko, UEA dum la lasta jarkvino havas sufiĉe stabilan membronombro, sume ĉirkaŭ 13 mil individuaj (IM) kaj aligitaj (AM, membroj de la landaj asocioj, aliĝintaj al UEA sen konsidero de IMoj). Ĉi tiu stabileco estas atingita, interalie, pro la ŝanĝo de la kotizsistemo, danke al kiu aperis malmultekosta (precipe por neriĉaj landoj) kategorio “Membro Baza”.

Tamen estas atentinde, ke sur la fono de la suma stabileco la plej enspeziga membrokategorio “Membro-Abonanto” (MA) daŭre ŝrumpas: 1238 en 2017, 1134 en 2018, 1033 en 2019, kaj nur 933 en la pasinta jaro 2020. Ĉi tiu nombro estas nur kvarono de la rekordo el la fora jaro 1991a, kiam en UEA estis 3954 MAoj.

Jaro	AM	IM	Sume
1979	24533	6277	30810
1980	27554	6629	34183
1981	29828	6727	36555
1982	29768	6556	36624
1983	31062	6446	37508
1984	32923	6272	39195
1985	33020	6536	39556
1986	33910	6679	40589
1987	36351	7291	43642
1988	35945	7203	43148
1989	32474	7355	39829
1990	25224	7645	32869
1991	19146	8071	27217
1992	18808	7783	26591
1993	16041	7272	23313
1994	14495	7018	21513
1995	13808	7237	21045
1996	13314	7284	20598
1997	13035	7122	20157
1998	12812	7360	20172
1999	12096	7075	19171
2000	12522	6583	19105
2001	12835	6479	19314
2002	10549	5713	16262
2003	11264	5714	16978
2004	12148	5854	18002
2005	12253	6107	18360
2006	11732	6066	17798

2007	11477	6011	17488
2008	12492	5702	18194
2009	12605	5713	18318
2010	10527	5288	15815
2011	10480	5321	15801
2012	10057	5046	15103
2013	10019	4903	14922
2014	9789	5027	14816
2015	9215	5501	14716
2016	8689	4365	13054
2017	8570	4501	13071
2018	8525	4581	13106
2019	8654	4162	12816
2020	8878	4293	13171

AIKo

Donacoj al la Ĝenerala Kaso de UEA en 2020 fluis abunde



En la lastaj jaroj UEA devis adapti siajn financojn al la mondaj evoluoj. Plej ofte oni aŭdas pri malkresko de enspezoj, ekzemple pro librovendoj aŭ pro la malalta rento ĉe investo kaj banko-kontoj. Sed foje la adaptiĝoj de la Asocio sukcesas kreskigi la enspezojn. Tiel okazis pri la Ĝenerala Kaso, tiu esenca parto de la Spezokonto, kiu akceptas donacojn sub 3 700 eŭroj, kiuj ne havas alian pli specialan celon ol subteni la Asocion.

Ĝis 2017 la Ĝenerala Kaso registris modestan jaran enspezon de kelkaj miloj da eŭroj. En la lastaj jaroj tamen tiu jara sumo forte kreskis, kun nova rekordo ĉiujare: en 2018, 12 535 eŭroj, kaj en 2019, 14 855 eŭroj. En la pasinta, pandemia jaro la Ĝenerala Kaso ricevis la rimarkindan sumon de 30 mil 97 eŭroj, pli ol duoble tiun ricevitan en 2019.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vilmos Benczik forpasis

La 27an de februaro 2021 en Budapeŝto forpasis

Vilmos Benczik (1945-2021)

Vilmos Benczik, hungara instruisto, literaturisto, tradukisto, eldonisto kaj esperantisto (1959) estis direktoro de la libroeldonejo de Hungara Esperanto-Asocio (HEA), en kiu sub lia direktado aperis 138 Esperanto-libroj sur 21 mil 429 paĝoj, kun la suma eldonkvanto pli ol 360 mil ekzempleroj; inter ili estis lernolibroj kaj vortaroj, originalaj beletraĵoj de István Nemere, Julian Modest, Lorjak k. a., reeldonoj de “klasikaj” Esperanto-libroj; tradukoj el la hungara kaj aliaj literaturoj, gravaj didaktikaj verkoj k. a.



Li kompilis kaj redaktis plurajn kolektivajn verkojn: *25 jaroj: Antologio de belartaj konkursoj* (kun William Auld, 1977), *Baza Literatura Krestomatio* (1979), *Hungara antologio* (1983), *Baza legolibro por komencantoj* (1986), *Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al William Auld kaj Marjorie Boulton* (1999) k. a. La revuo *Hungara Vivo* danke al lia pli ol dudek-jara redaktado (1977-90) iĝis grava internacia kultura revuo kun ĉirkaŭ du mil abonantoj (duono en Sovetunio).

Vilmos Benczik verkis plurajn artikolojn, recenzojn, antaŭ- kaj postparolojn (kelkaj el ili aperis en liaj eseeroj: *Studoj pri la Esperanta literaturo*, 1980; kaj *Pri la natureco kaj artefariteco de lingvoj kaj aliaj studoj*, 2016) kaj tradukis. Li estis prezidanto de HEA (1990-92), komitatano de UEA (1980-86), prezidanto de la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj de UEA (1986-2002), membro de la Akademio de Esperanto (2001-21). En 2016 oni elektis lin honora membro de UEA.

Ekde la 68a Universala Kongreso (Budapeŝto, 1983) ni dum preskaŭ kvardek jaroj subtenis kunlaborajn kaj amikajn rilatojn kun Vilmos, kiu, interalie, estis la unua eksterlanda esperantisto, vizitinta Uralon post la Dua Mondmilito (en 1989). Laste ni renkontiĝis en julio 2018 en Budapeŝto por agrable ripozi, ekskursi kaj interkonsenti pri kelkaj projektoj, el kiuj en 2019 realiĝis *Baza Literatura Krestomatio*. La 28an de februaro en nia novaĵretejo devis aperi letero de Nikolaj Ĥoĥlov al Julio Baghy, kiun li kopiis por ni, sed anstataŭe ni aperigis ĉi tiun mortanoncon.

Vilmos Benczik mortis la 27an de februaro, je la mortodatreveno de Kálmán Kalocsay, kun kiu Vilmos konatiĝis ankoraŭ kiel lerneĵano. De nun je ĉi tiu dato ni rememoros ilin ambaŭ tiom longe, kiom ni vivos.

Ni funebras kune kun ĉiuj, kiuj lin konis, kaj sendas niajn kondolencojn al liaj filinoj Judit kaj Mónika.

**Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov**

Viktor Kloĉkov ne plu vivas

La 14an de marto 2021, ses tagojn antaŭ sia 70-jariĝo, en Jekaterinburgo forpasis

Viktor Anatoljeviĉ Kloĉkov (1951-2021)

Viktor estis konata urala ĵurnalisto kaj eldonisto, redaktoro de la populara monata revuo *Uraljskij Sledopyt*, direktoro de la plej granda Urala eldonejo Sredne-uraljskoje kniĵnoje izdatel'stvo kaj de la privata eldonejo *Ural-Sovety*, aŭtoro de centoj da artikoloj.

Lerninte Esperanton en 1979, Viktor publikigis en gazetaro artikolojn pri Esperanto kaj pri interlingvistiko. En 1988 li prizorgis la oficialigon de Urala Esperantista Societo (UES) kaj prezidis ĝin ĝis februaro 1992, kiam surbaze de UES fondiĝis Ruslanda Esperanto-Asocio (REA), kies vicprezidanto li restis ĝis novembro 1994, kiam REA kaj REU unuiĝis.

En 1991 Viktor Kloĉkov kune kun ni fondis la gazeton *La Ondo de Esperanto* kaj la eldonejon *Sezonoj*, por kiuj li disponigis la aparataron de sia eldonejo kaj gastigis en la redakcia palaceto de *Uraljskij Sledopyt* Esperanto-Centron kun la biblioteko KEB.

Post la migro de *Sezonoj* kaj *La Ondo*, kies redakciano li estis dum 1991-97, al Kaliningrado, Viktor malofte partoprenis Esperanto-eventojn, interalie, en junio 2012 kiel honora observanto de la KER-ekzameno en Jekaterinburgo.

Ni funebras pro la forpaso de nia amiko, sen kies helpemo ni apenaŭ povus fariĝi profesiaj esperantistoj, kaj kondolencas al lia edzino Natalja, al liaj filinoj Varvara kaj Jekaterina, al ĉiuj liaj proksimuloj kaj samideanoj.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov



Irena Alijoŝiūtė forpasis

La 28an de januaro 2021 en Vilno pro la koronaviruso forpasis

Irena Alijoŝiūtė (1948-2021)

Ŝi laboris en la statistika oficejo en Vilno kaj en la ministerio pri komunuma mastrumado. Lerninte Esperanton en 1970, ŝi aliĝis al la junulara Esperanto-klubo *Juneco* (Vilno), kie ŝi aktivis, interalie, kiel la kluba sekretario. En 1992-99 ŝi profesie laboris kiel la respondeca sekretario de LEA en la Zamenhofa domo en Kaŭno.

Reveninte al Vilno, ŝi daŭrigis sian sekretarian laboron en la ĉefurbo de Litovio. Kiel la asocia sekretario Irena faris multegan laboron: ŝi akceptis eksterlandajn gastojn, organizis kursojn kaj kongresajn vojaĝojn, kunorganizis BETojn kaj ĉiujarajn landajn kongresojn kaj Zamenhof-Tagojn en Kaŭno.

Ŝia kontribuo al la Esperanto-Movado en Litovio estas nesupertaksebla.

Ni funebras kaj kondolencas al la parencoj kaj amikoj de nia amikino Irena, kiu ekde nia establiĝo en Kaliningrado dum preskaŭ dudek jaroj ofte helpis nin en nia agado.

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov





INTERNACIA TAGO DE VIRINOJ

Ĉi-jare okaze de la Internacia Virina Tago, la 8a de marto, siajn porokazajn deklarojn publikigis UEA, TEJO (ilia bildo estas ĉi-supre) kaj la Esperanta Civito. Notindas, ke la tekstoj, malkiel kutime, ne limiĝas al nur banalaj gratuloj. Legu kaj komparu.

Nia mondo disfalas

de Stanislav Belov

Nia mondo disfalas. Ĉu vi rimarkis tion? Temas ne pri disfalo fizika, sed pri la kultura, politika kaj komunika. Ĝi ne aspektas kiel mondfino, tamen ĝiaj sekvoj estas vere katastrofaj. Ŝajnas ke eĉ la Lingvo Internacia ne kapablas mildigi ilin.

Fiasko de la esperoj

Ĉu vi memoras la entuziasmon de la 1980aj jaroj? La fera kurteno falis, la aŭtoritataj reĝimoj en Orienta Eŭropo foriris senreziste, merkata ekonomio kaj demokratiaj registaroj ekregis ĉie, kaj la fascinita Francis Fukuyama proklamas “Finon de historio” – ja la venko de liberalismo ŝajne markis la finon de la politika kaj socia evoluo.

Kio restis de tiu epoko? Preskaŭ nenio. Ni vivas sur ruinoj de tiamaj esperoj kaj vanaj revoj. La Varsovia pakto malaperis, sed NATO restis kaj kreskis – malgraŭ promesoj al la naiva Miĥail Gorbacĥov. Eŭropa Unio kreskis duoble, sed fendigis interne. La araba printempo transformiĝis je araba vintro, alportinte anstataŭ demokration kaj prosperon novajn diktaturojn kaj militojn. La plej potenca ŝtato de la mondo plonĝis je la militon kontraŭ teroro – la unua en la mondo milito direktita ne kontraŭ lando aŭ ideologio, sed kontraŭ batalmetodo – kaj detruinte plurajn landojn atingis nenion.

Oni multe babilis pri tutmondiĝo, sed fine la mondo disfalis je tri ĉefaj potencoj – Usono, Ĉinio kaj Ruslando – ĉirkaŭ kiuj grupiĝas satelitoj kaj navedas klientoj. Rilatoj inter tiuj ĉi mondpotencoj atingis sian malpinton, kaj iliaj militistoj ĉiam pli ofte provokas unu la aliajn, evitante grandan konfrontiĝon nur lastmomente. Feliĉe, ĉiam haveblas mortigeblaj anstataŭantoj de la vera malamiko – nun por tio servas loĝantoj de Sirio kaj Libio – sed jen kaj jen kugloj trafas malamikon rekte kaj obusoj eksplodas tro proksime al trupoj de la grandaj armeoj.

La internacia politiko degeneris kompare ne nur al la fajnaj diplomaciaj ludoj de la 18a jarcento kaj “reala politiko” de la jarcento 19a, sed eĉ superis la obstinan stuporecon de la Malvarma Milito. Anstataŭ intertraktoj aŭdiĝas nur laŭtaj deklaroj, anstataŭ kunlaboraj programoj naskiĝas koleraj tvitaĵoj kaj lokon de internaciaj koalicioj okupis primitiva klabo de sankcioj – senfinaj kaj senrezultaj.

Ŝajnas, ke neniu speciale indignis, kiam Donald Trump rakontis, ke li nur lastmomente nuligis ordonon murdi prezidenton de Sirio. Lia posteulo promesis tute kontraŭian politikon, sed komencis sian oficperiodon, bombardante la saman Sirion kaj dirinte ke la prezidanto de Ruslando estas murdisto. Ne estas mirinde, ke tiu lasta respondis per infana ŝerco – jam ne eblas trakti tiaĵojn serioze.

Cetere ankaŭ la interna politiko ne elvokas iaman entuziasmon. “Tio estas ne demokratio, tio estas moko. Homaj rajtoj, libereco, demokratio – ĉio ĉi transformiĝis je parodio”, – amare konstatis la franca filozofo Jean Baudrillard nelonge antaŭ sia morto en 2007. Apenaŭ li imagis kiom multe ni sukcesis malprogresi ĝis 2021.

Manipulado anstataŭ informado

Ĉu ni povas kontraŭi tion? Apenaŭ. La historia procezo evoluas sub influo de la fortoj oble pli povaj ol iu ajn individuo aŭ grupo. La ondo devas atingi sian pinton antaŭ ĝi falos por malaperi kaj cedi lokon al sekva ondo. Ni povas nur pene deteni tiun ĉi ondegon de disfalo je kompleta ĥaoso, zorgi, ke maturiĝanta frukto ne pereu pro subita frostiĝo, nek putru surarbe post maturiĝi. Por tio ni devas fari du aferojn – pensi kaj interŝanĝi niajn pensojn. Ĉu simpla tasko?

Sed nome tio ĉi iĝas ĉiam pli komplika afero. Ideo pri gazetara libereco kiel nepra trajto de ĉiu demokratia socio jam meritas en vortaroj rimarkon “arkaika”. Arda korporacioj regas la tutmondajn gazeton kaj televidon, laŭplaĉe manipulante je amasa konscio. Produktado kaj konsumado de novaĵoj iĝis same industriskala afero kiel fabrikado de aŭtoj aŭ maĉgumo. Du mondoj definitive interplektiĝis – la potenco, kiu helpas gajni monon, kaj la mono, kiu helpas gajni potencon.

Dum kelkaj jaroj ĉiutage amaskomunikiloj histeriis pri la “senduba” enmiksiĝo de Ruslando je la prezidanta baloto en Usono (“la usonanoj mem neniam elektus Trumpon!”). La fina raporto de la prokuroro Robert Mueller agnoskis mankon de ajnaj pruvoj – jaroj da enketado rezultigis je nenio krom supozoj kaj konjektoj. Sed kiu zorgas? La nova prezidento jam ripetis la samajn akuzojn kaj deklaris ke li “pagigos” Ruslandon pro tio.

Eŭropanoj ofte mokas la usonanojn pro ties malklereco, sed efektive ili estas same subiĝintaj al la amaskomunikila manipulado. Demandu iun ajn eŭropanon kio okazis en Sud-Osetio en 2008, kaj tiu diros ke la granda Ruslando atakis la etan Kartvelion kaj aneksis parton de ĝi. Mi rememoras, kiel mi diris al pola amiko, ke komisiono de Eŭropa Unio, esplorinta la aferon, konkludis, ke la militon komencis Kartvelio, rompinta la internacian juron kaj Ruslando defendis siajn pactrupojn, lokitajn en Sud-Osetio surbaze de internacia kontrakto. “Ĉu tio estas publikigita ie?” miris la eŭropano. Tiutempe la raporto jam dek jarojn polviĝis en la arkivoj de Eŭropa Unio dum en la amasa konscio firme enradikiĝis fabelo, plantita de amaskomunikiloj.

Oni esperis, ke sociaj retoj kaj Interreto ĝenerale solvos tiun problemon, ebligante al la homoj rektan kaj liberan aliron al informoj kaj interŝanĝon de opinioj. Sed ankaŭ tiuj esperoj montriĝis vanaj. En Interreto efektive eblas trovi preskaŭ iujn ajn informojn, sed 90% de la uzantoj kontentiĝas je kelkaj plej popularaj informfontoj, kiuj estas same regeblaj kaj manipuleblaj kiel la gazetaro kaj la televido. Oni ofte plendas pri blokado de Guglo kaj eksterlandaj sociaj retoj en Ĉinio. Tamen la

esploroj montris, ke plejparto de la ĉinoj tute ne suferas pro tio kaj eĉ eksterlande plu uzas nur ĉinajn retejojn kaj retservojn – ili simple ne interesiĝas pri la aliaj.


Same okazas en Ruslando, kie funkcias abundo da sendependaj retejoj, kaj homoj povas esprimi sian opinion libere, sed plejparto simple ripetas la enhavon de la novaĵoj, ĉerpitaj el siaj kutimaj fontoj – porregistaraj aŭ opoziciaj. La sociaj retoj anstataŭ kontribui al diverseco de la opinioj kreas por ĉiu lian propran mondon, en kiu alternativaj opinioj ne ekzistas. Kaj Esperanto montriĝis same senefika kiel ĉiuj aliaj lingvoj kontraŭ tiuj nevideblaj muroj, disigintaj la homojn.

Komforta bobelo

Vi certe rimarkis ke Fejsbuko montras al vi ĉefe homojn, kies afiŝojn vi ŝatis kaj novaĵojn de retejoj, kiujn vi aktive komentis. Tio kreas por ĉiu uzanto medion komfortan kaj samtempe trompan. Kun ĉiu ŝatoklako li foriĝas de la alternativaj opinioj, ĉirkaŭinte sin per informa bobelo, el kiu videblas la aliuloj, sed ne aŭdeblas iliaj voĉoj. Cetere, eĉ se foje uzanto renkontas opiniojn, malkonformajn al liaj propraj, li simple ignoras ilin anstataŭ pripensi kaj preparoli – ja por tio sufiĉas nur svingi la fingron kaj la bendo ruliĝos malsupren, dronigante oponanton en forgeso de Fejsbukaj unutaĝoj. Kaj esperantistoj kondukas same blinde, preferante komforton de pretaj respondoj ol ilian memstaran serĉadon. Mi spertis tion plurfoje.

Antaŭ jaroj mi komentis afiŝon de pola esperantisto, klariginte, ke rilatoj inter la ŝtato kaj eklezio en Sovetunio ne estis tiel simplaj, kiel li prezentas ilin, sed ili variis de arda konfrontiĝo en la 1920aj jaroj ĝis aktiva kunlaboro en la 1940aj kaj ĝenerala indiferento en la 1980aj, do preĝejoj estis jen fermataj, jen malfermataj.

“Mensogo denove!” – eksplodis la polo, entuziasme batalanta kontraŭ kaŝitaj komunistoj (ĉefe per bildoj en sociaj retoj). “Oni ne povis remalfermi tiujn preĝejojn, ĉar ĉiuj preĝejoj en Sovetunio estis detruitaj! Mi vidis tion en Jutubo!” Kaj li aldonis ligilon al iu pola filmeto. Mi respondis per foto de la romkatolika preĝejo Sankta Jozefo, konstruita de poloj en mia urbo Tjumenen en 1903-1906 kaj klarigis, ke mi loĝas cent metrojn de ĝi, do mi povas



Tjumenen. Romkatolika preĝejo S-ta Jozefo. (Foto: Stanislav Belov)

atesti ke ĝi plu ekzistas kaj funkcias. Cetere, tion povus konfirmi (iam) ankaŭ la papo Johano Paŭlo la 2a, sanktiginta la preĝejan sonorilon antaŭ ĝia sendo el Pollando en 1999, kaj pola pastro servanta tie. Sed ĉu tio efikus? Ĉu mia oponento agnoskis sian eraron aŭ almenaŭ faris pliajn demandojn? Li simple silentiĝis kaj forigis min en sia amiklisto. Lia informa bobelo restis netuŝita.

Tiaĵoj ripetiĝis plurfoje. Mi ofte sentas min kiel homo, kiu penas klarigi, ke mamutoj formortis, sed mi aŭdas responde indignan neadon: “Ne mensogu! Mi ĵus vidis en televido mamuton vagantan tra Afiko! Li aspektas tute viva, ĝi nur perdis la harojn, evidente pro varmego”. Li *kredas* ke li pravas, do li ne bezonas la faktojn.

La plej mirinda afero estas, ke tio okazas ne nur al sencerbuloj, kies menso frostiĝis en la tempo de la Malvarma milito, sed ankaŭ al homoj oble pli inteligentaj kaj informitaj.

En 2017 mi recenzis la romanon *Amo inter ruinoj* de Trevor Steele, dediĉitan al la lastaj jaroj de Sovetunio kaj bazitan sur liaj propraj spertoj kaj rememoroj. Laŭdinte la bone transdonitan etoson de tiu tempo, mi tamen devis listigi abundon da eraroj koncerne la faktojn, nomojn, vortojn kaj kutimojn, kiuj transformis la priskribitan lokon je iu fabela lando, apenaŭ rekonebla. Kiel reagis la aŭtoro?

En sia komento ĉe *Monato* li nur riproĉis min pro la tro longa recenzo (kvazaŭ nombro da listigitaj eraroj dependis de mi) kaj aldonis: «Do mi ne asertas neerarpovon, sed mi preferas kredi la vortojn de miaj multaj konversacipartneroj de 1990-91 ol la “faktoj” de s-ro Belov. Ekzemple li asertas, ke “nur du judoj” estis murditaj en Estonio de la stalinaj agentoj, kaj tio okazis en 1949, ne 1939. Do, kiu pravas: s-ro Belov, aŭ la estonaj esperantistoj, kiuj rakontis al mi pri la murdo de siaj familianoj en 1939».

Mi estis ŝokita. Kvin minutoj da serĉado en Vikipedio sufiĉus por kompreni, ke li konfuzis du malsamajn eventojn – reprezaliojn okazintajn en Estonio en 1939 kaj kampanjon kontraŭ “kosmopolitoj”, lanĉitan en 1949 en la tuta Sovetunio. Sed por kio serĉi la *faktojn*, se vi jam havas *kredon*?

Ĉio ĉi memorigis al mi scenon el la filmo *Sinjorino malaperas* (The Lady Vanishes) de Alfred Hitchcock. Tie psikologo multe babilas pri eventualaj kialoj de “falsa rememoro” de la ĉefa heroino perdinta sian amikindon en trajno kaj post aŭdi, ke tiu tamen ekzistas kaj estis ŝtelita, li ne perdas sian aplombon eĉ por unu sekundo. “Via teorio fiaskis!” – atakas la junulino. “La teorio estis bona. La faktoj estas fuŝaj”, – trankvile respondas la “fakulo”.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

^{al}
Zagrebo, la 11^a de Jan. 1923.

Mia kara, belanima amiko,

La hieraŭa tago estis por mi efektive felicia,
ĝusplena tago - mi ne trograndigas la faktoron,
ĉar mi ricevis viajn longajn, korajn leterojn.

Kiel ĉio en la mondo, ĝi enhavis en si ankoraŭ
malmultajn partojn, nome ĝi rakontis al mi
pri via longa, bedaŭrinda malsano. Sed jam
en tio estas por mi la feliĉo, ke viaj kondolencoj,
kiujn mi nun sendas al vi pro via
malsano, estas postfaktaj kaj ke vi denove,
mi esperas, sentas vin bonege.

Okaze de la 130a naskiĝdatreveno de Nikolaj Ivanoviĉ Ĥohlov (1891-1953), konata en Esperanto kiel Nikolao Hohlov, en nia novaĵretejo estas publikigitaj kelkaj tekstoj de/pri la poeto. En ĉi tiu *Ondo* aperas unu el ili: letero de Ĥohlov al Julio Baghy, verkita antaŭ preskaŭ cent jaroj.

Jubileoj kaj memordatoj en aprilo 2021

10. Antaŭ 60 jaroj mortis **Louis Bastien** (1869-1902-1961), franca armeano, generalo kaj esperantisto; vicprezidanto de la franca landa asocio SFPE (1928-44), prezidanto de UEA (1934-36), post la skismo en 1936 prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo (1936-47), ĉefkunlaboranto de *Enciklopedio de Esperanto*, aŭtoro de *Naŭlingva etimologia leksikono de la lingvo Esperanto* (1907), *Vocabulaire de poche français-Esperanto* (1932) kaj *Militista vortareto* (1955). Membro de Lingva Komitato (1909-48) kaj Akademio de Esperanto (1934-57), honora prezidanto de UEA (1947-61).

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 28-29.

11. Antaŭ 105 jaroj dum la batalo ĉe Verdun pro obusa trafo pereis **Théophile Rousseau** (pron.: rusó, 1876-1905-1916), franca profesoro de matematiko, disvastiganto de Esperanto, precipe en turismo, iniciatoro de Esperanto-oficejoj; kuniniciatoro, defondiĝa komitatano kaj vicprezidanto de UEA.

16. Antaŭ 35 jaroj mortis **Veselin Damjanov** (Дамьянов, 1925-1974-1986), bulgara opera kaj opereta kantisto, profesoro en Bulgara Ŝtata Filharmonio, laŭreato de pluraj muzikaj premioj, Merita Artisto de Bulgario; li plurfoje koncertis en Esperantaj kongresoj kaj kantis en Esperanto dum siaj turneoj. Inter liaj diverslingvaj muzikaj registraĵoj estas ankaŭ kelkaj en Esperanto: *Veselin Damjanov kantas en Esperanto* (disko, 1978), *Serenado al fraŭlino Loli kaj kvar aliaj kantoj* (disko, 1981), *Papageno kaj du grandaj arioj* (kun Agathe Soemer-Pascali, disko, 1982), *Veselin Damjanov koncertas en Kanado* (kasedo, 1985), *Jubilea koncerto* (disko, 1985), *Emocioj* (kun Joëlle Rabu, posteume eldonita KD, 2014).

21. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Gunnar Gällmo** (1946-195?-), sveda tradukisto, budhano kaj esperantisto, prezidanto de Budhana Ligo Esperantista; aŭtoro de *Wolfgangerl* (1990), *Mokrokalvo la gigantegegego* (1999), *Kelkaj faktoj pri la budhismo* (2002), *Kantoj de la veraj homoj* (2006); tradikinto de *La Dharmo-pado* (2002), *Nemeza* (A. Nobel, 2003), *La korto* (K. Lundberg, 2015), *Malvarma bufedo* (J. Wrangborg, 2017).

25. Antaŭ 155 jaroj naskiĝis **Carlo Bourlet** (pron.: burlé, 1866-1900-1913), franca matematikisto, akademiano kaj esperantisto (N^o6484); unu el la plej gravaj figuroj en la historio de Esperanto. Li interesigis pri Esperanto la amasan asocion Touring-Club kaj la prestiĝan eldonejon Hachette et Cie, prezidis la Parizan Esperanto-Grupon (la plej aktiva kaj amasa en la mondo), kunorganizis la unuajn UKojn, kunfondis kaj estis la unua sekretario de ISAE (1907); iniciatis kaj direktis

La Revuo en kiu aperis ankaŭ liaj originalaj kaj tradukitaj verkoj; verkis librojn kaj broŝurojn en/pri Esperanto, inter kiuj elstaras *Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto* (1905), konata kiel “la ruĝa broŝuro”, kies francaj eldonoj aperis en la suma eldonkvanto 550 mil ekz., kaj kiu aperis ankaŭ en pluraj alilingvaj versioj.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 44-46.

25. Antaŭ 110 jaroj naskiĝis **Károly Fajsi** (pron.: fájsi, 1911-1964-2004), hungara poŝtoficisto kaj esperantisto; kunfondinto de Esperanto-Asocio pri Poŝto kaj Telekomunikado (IPTEA); aŭtoro de Esperanto-lernolibro por hungaroj (1966), elstara Esperanto-kolektanto, kies kolekto enhavis 17 mil librojn, ok mil binditajn jarkolektojn de gazetoj k. m. a.; honora membro de UEA (1991); en 2002 lian kolekton aĉetis la kultura ministerio de Hungario kaj transdonis ĝin al la landa fremdlingva biblioteko en Budapeŝto.

Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro*, p. 88-89.

25. Antaŭ 60 jaroj naskiĝis **Mihail Konstantinoviĉ Ĉertilov** (Чертюлов, 1961-1986-2018), sovetunia kaj ruslanda inĝeniero kaj esperantisto, plurfoja estrarano kaj unumandata prezidanto (2009-10) de REU, tradukinto de *Invado: Tero* (2012) de H. Harrison, kuntradukinto (kun S. Smetanina) de *La nokta patrolo* (2006-07) kaj *Kavaliroj de kvardek insuloj* (2009) de S. Lukjanenko.

28. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Elna Matland** (1921-1939-2011), norvega instruistino kaj esperantistino, prezidanto aŭ sekretario de la Esperanto-kluboj en Bergeno kaj Sauda, estrarano de la Norvega Esperantista Ligo kaj ĝia prezidanto (1985-1991), komitatano de UEA (1983-95), prezidanto de LKK de la 76a UK en Bergeno (1991), Honora Membro de UEA (1992).

28. Antaŭ 40 jaroj mortis **Endre Tóth** (1931-1960?-1981), hungara muzikisto, instruisto, redaktoro, verkisto kaj esperantisto, blindiĝinta en 1945 pro eksplodo de mino; aŭtoro de verkoj hungaraj, germanaj kaj Esperantaj, kiuj aperis unu jaron post lia morto en la novelaro *Lappar, la antikristo* (1982), alte taksita de la kritiko kaj legantaro.

30. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Juan Eduardo Bachrich** (denaske: Johann Eduard Bachrich, 1921-1938-2005), aŭstria agrikulturisto kaj esperantisto, post la Dua Mondmilito migrinta al Venezuelo, kie li estis peranto (1974-2001) kaj komitatano (1992-98) de UEA; subvenciinto de la vidkursoj *Mazi en Gondolando* kaj *Esperanto: Pasporto al la tuta mondo*; honora membro de UEA (2000). Danke al la donaco de liaj gefiloj UEA starigis la fondaĵon “Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich”, kiu helpas pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj.

Aleksander Korjenkov

Letero de N. Ĥohlov al J. Baghy

Zagrebo, la 11an de Jan. 1923.

Mia kara, belanima amiko,

La hieraŭa tago estis por mi efektive feliĉa, ĝuoplena tago – mi ne trograndigas la fakton, ĉar mi ricevis vian longan, koran leteron. Kiel ĉio en la mondo, ĝi enhavis en si ankaŭ malluman parton, nome ĝi rakontis al mi pri via longa, bedaŭrinda malsano. Sed jam en tio estas por mi la feliĉo, ke miaj kondolencoj, kiujn mi nun sendas al vi pro via malsano, estas postfaktaj kaj ke vi denove, mi esperas, sentas vin bonege.

Mi estas infane feliĉa sciante, ke mia artikolo, dediĉita al vi, same kiel ĝia surpriza apero antaŭ viaj okuloj, – plezurigis vin. Miaflanke mi estas ne malpli feliĉa vidinte ĝin presita en la amata kaj bonvena “L.M.”¹.

Mi jam ekamis kaj nun pasie amas vian komunan infanon kaj kiel donacojn al tiu novenaskito mi ĉiam volus doni la plej bonajn, noblajn kaj sincerajn fruktojn de mia cerbo kaj koro.

Ne malpli ol ĝia aspekto efikas min la grava seriozeco kaj certeco de ĝia redaktantaro. Dum preskaŭ en ĉiu numero de “Esp Tr.” la ambicia T. J.² piedfrapas la ombreon de via ĵurnalo – vi dece kaj senresponde faras vian noblan agadon. Tio pravas pli argumente ol la polemiko kaj la enhavo de “LM” estas tiel nerefutebla por la atakantoj.

Kara Baghy! Kiel talente estis skribita via “Songô de l' morto”³... Mi ĝuis, mi forgesis en kia lingvo estis skribita la enhavo... Ĝi penetris tre profunde en mian koron per sia artiste pentrita temo. Mi hontas paroli ion ajn pri miaj propraj laboroj apude de la viaj. Ili estu nur malgrandaj satelitoj, lumigitaj de la unuaranga astro! Mi vidas ke vi ne nur estas bona poeto, bona esperantisto, bona stilisto Esperanta, sed ke, ĉefe, vi estas la esteto kaj belamanto. Kaj kiel grandan benon vi ricevis por ĉio la forton aktivan, kreantan. Mian vorton de honoro – eĉ unu vorteton mi ne diras flatante. Akceptu ilin kiel amikan veran aprobon. Nur pri unu sola afero mi nun revas – mi revas, kiam aperos viaj poemoj en la anoncita eldonota libro. Mi revas, la homo kelkafoje perdinta la fadenon de artista sento, kiel antaŭe en la gimnazio, ŝtelante de mi mem la tempon necesan por plenumi la taskojn, super la libro de amata poeto – tiel nun mi ankaŭ revas inter la frapoj de mordanta kaj senindulga aktualeco.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



La sepa ero en nia ciklo pri la rusaj romanoj de la 20a jarcento estas *Doktoro Ĵivago* de Boris Pasternak (1890-1960), unue publikigita en 1957. Ĉar la romano kaj la historio de ĝia publikigo kaj posta kritikado de Pasternak en Sovetunio estas bone konataj al ĉiu literaturŝatanto, ni decidis publikigi fragmentojn el ĝi sen antaŭparolo.


Sur la supra bildo estas Oleg Menjŝikov en la rolo de Jurij Ĵivago en la 11-filma serio *Doktoro Ĵivago* (2005) de A. Proŝkin.

Doktoro Ĵivago

de Boris Pasternak

La dek-unua parto

LA ARBARA ARMEO



1

Jurij Andrejeviĉ jam la duan jaron estis kaptito de la partizanoj. La limoj de ĉi tiu mallibero estis tre svagaj. La malliberejo de Jurij Andrejeviĉ ne havis barilojn. Oni nek gardis, nek observis lin. La partizana trupo ĉiam moviĝis, kaj ankaŭ Jurij Andrejeviĉ marŝis kun ĝi. Ĉi tiu trupo ne apartiĝis kaj ne forbaris sin de la cetera popolo, tra kies loĝlokoj ĝi iris. La trupo miksiĝis kun ĝi kaj dissolviĝis en ĝi.

Ŝajnis, ke ĉi tiuj dependo kaj kaptiteco ne ekzistas, ke la doktoro estas libera kaj nur ne scias uzi sian liberon. La dependo de la doktoro kaj lia kaptiteco tute ne diferencis de aliaj specoj de devigo en la vivo, same nevideblaj kaj nepalpeblaj, kiuj same ŝajnas io neekzistanta, ĥimera kaj imagata. Malgraŭ la manko de katenoj, ĉenoj kaj gardistoj, la doktoro estis devigata submetiĝi al sia mallibero, kiu aspektis kvazaŭ imagata.

Post ĉiu el liaj tri provoj eskapi de la partizanoj, ili kaptis lin. Li ne estis punita, sed tio estis danĝera ludo kun fajro. Li ne plu ripetis siajn provojn.

La partizana estro Liverij Mikulicin indulgeme rielatis al li, invitis lin dormi en sia tendo, kaj ŝatis interparoli kun li. Jurij Andrejeviĉ sentis pezan malkomforton pro ĉi tiu trudita proksimeco.

2

Dum tiu periodo¹ la partizanoj preskaŭ senĉese retretis orienten. Iam ĉi tiu moviĝado estis parto de la ĝenerala ofensiva plano por forpeli Kolĉakon² el okcidenta Siberio. Iam, kiam la blankuloj proksimiĝis al la partizanoj de malantaŭe, la daŭre samdirekta moviĝado transformiĝis al defensivo. La doktoro longe ne povis kompreni ĉi tiun enigmon.

La urbetoj kaj vilaĝoj ĉe la ĉefvojo, paralele al kiu, sed foje laŭ kiu, okazis la retetado de la partizanoj, estis malsamaj, blankaj kaj ruĝaj, depende de la ŝanĝiĝanta milita fortuno. Malofte laŭ ilia aspekto oni povis scii, kiu potenco regas ilin.

Kiam ĉi tiujn urbetojn kaj vilaĝojn trapasis la kamparana milicio, la ĉefa afero en ili iĝis ĝuste ĉi tiu treniĝanta armeo. La domoj ambaŭflanke de la vojo ŝajnis kunpremiĝi kaj profundiĝi en la teron, sed la rajdantoj, ĉevaloj kaj kanonoj, plaŭdantaj en koto, kaj la tumultaj altaj infanterianoj kun rulitaj armeaj paltoj³ ŝajnis sur la vojo pli altaj ol la domoj.

Foje en unu el ĉi tiuj urbetoj la doktoro estis akceptanta predon – stokon de anglaj medikamentoj, kiun forlasis retiriĝanta oficira trupo de Kappel⁴.

Estis malluma, pluva tago dukolora. Ĉio lumigita ŝajnis blanka, ĉio nelumigita – nigra. Ankaŭ en lia animo estis la sama mallumo de simpligo, sen mildigaj transiroj kaj duontonoj.

La vojo, tute detruita pro oftaj armeaj marŝoj, estis torento de nigra koto, kiun oni ne ĉie povis transiri. La strato estis transirebla nur en kelkaj lokoj, sufiĉe foraj unu de la aliaj, kaj oni devis longe ĉirkaŭiri sur ambaŭ flankoj de la strato por atingi ilin. En tiu situacio la doktoro renkontis en Paĵinsk sian iaman trajnan kunveturanton Pelageja Tjagunova.

Unue ŝi rekonis lin. Li ne tuj komprenis, kiu estas ĉi tiu virino kun la konata vizaĝo, ĵetanta al li de la transa vojflanko, kvazaŭ de unu kanala kajo al la alia, ambiguajn rigardojn, jen plenajn de la decido saluti lin, se li rekonos ŝin, jen esprimantaj la pretecon retiriĝi.

Post unu minuto li rememoris ĉion. Kune kun la bildoj de la plenplena varvagono, amaso da kaptitoj por deviga laboro⁵, iliaj gardistoj kaj pasaĝerino kun harligoj ĵetitaj surbruste, en la mezo li ekvidis siajn karulojn. La detaloj de la antaŭpasintjara familia vojaĝo tre klare ĉirkaŭis lin. La karaj vizaĝoj, kiujn li terure sopiris, kvazaŭ vivaj aperis antaŭ li.

Per kapmovo li signis, ke Tjagunova iru pli supren laŭ la strato al la loko, kie oni povis transiri la straton sur ŝtonoj eliĝantaj el la koto; li mem paŝis al ĉi tiu loko, transiris la straton, venis al Tjagunova kaj salutis ŝin.

Ŝi multon rakontis al li. Memoriginte al li pri la bela kaj nemalvirtigita knabo Vasja, neleĝe aligita al la laborarmeo, kiu veturis kun ili en la sama varvagono, ŝi priskribis al la doktoro sian vivon ĉe la patrino de Vasja en la vilaĝo Veretenniki. Ŝi bone fartis ĉe ili, sed la vilaĝanoj ĉiam diris al ŝi, ke ŝi en la vilaĝo estas alveninto kaj fremdulino. Oni riproĉis ŝin pro tio, ke ŝi, laŭ ilia elpensado, estas konkubino de Vasja. Ŝi estis devigita forveturi, por ne esti molestata ĝismorte. Ŝi ekloĝis en la urbo Krestovozdvijensk ĉe sia fratino Olga Galuzina. Aŭdita onidiro pri tio, ke Prituljev estis vidita en Paĵinsk, logis ŝin ĉi tien. Ĉi tiu informo evidentiĝis falsa, kaj ŝi, ricevinte laboron, provizore restis ĉi tie.

Intertempe okazis malfeliĉo al la homoj karaj al ŝi. El Veretenniki venis informo pri arma punekpedicio al la vilaĝo pro neplenumo de la provianta regularo⁶. Ŝajne

la domo de Brykinoj forbrulis, kaj pereis iu el la familio de Vasja. En Krestovozdvijensk oni konfiskis la domon kaj la posedaĵon de Galuzinoj. Ŝian bofraton oni malliberigis aŭ pafekzekutis. La nevo senspure malaperis. Post la malriĉiĝo Olga komence suferis pro mizero kaj malsato, kaj nun ŝi laboras kiel servistino kontraŭ nutrado ĉe parenca kamparana familio en la vilaĝo Zvonarskaja.

Laŭ hazarda koincido Tjagunova laboris kiel lavistino en la Paĵinska apoteko, kies havaĵon la doktoro devis rekvizicii. La rekvizicio signifis ruiniĝon por ĉiuj, kiuj laboris en ĝi, ankaŭ por Tjagunova. Sed la doktoro ne havis la povon nuligi ĝin. Tjagunova ĉeestis la transdonadon de la varoj.

Oni venigis la ĉaron de Jurij Andrejeviĉ al la teneja pordo en la postapoteka korto. El la tenejo estis portataj sakoj, kestoj kaj botelegoj ĉirkaŭplektitaj per vimenaj vergoj.

Kune kun la homoj al la ŝarĝado triste rigardis el sia stalo la magra kaj faviĝinta ĉevalino de la apotekisto. La pluva tago ekvesperiĝis. La ĉielo iomete heliĝis. Por minuto inter la nuboj aperis la suno. Ĝi estis subiranta. La sunradioj kun malhelbronzaj koloroj ŝprucis sur la korton, sinistre origante la flakojn de likva sterko. La sterka koto ne moviĝis pro la pezeco, sed la akvo, verŝita de pluvoj sur la ŝoseon, ondetiĝis pro la vento kaj vermiljone fajreris.

Kaj la armeo daŭre marŝis laŭ la randoj de la vojo, ĉirkaŭpaŝante kaj ĉirkaŭveturante la plej profundajn flakojn kaj kavojn. En la kaptita medikamenta stoko estis trovita vazo da kokaino, kiun lastatempe ekŝatis flari la ĉefo de l' partizanoj.

3

La doktoro en la partizana trupo dronis en laboroj ĝis super la oreloj. Vintre estis tifo, somere – disenterio, kaj dum la batalaj tagoj krom tio kreskis la nombro da vunditoj.

Malgraŭ la malvenkoj kaj preskaŭ ĉiama retretado, la partizanajn vicojn konstante plenigis novaj ribelantoj el la trapasataj lokoj kaj dizertintoj el la malamika tendaro. Dum unu jaro kaj duono, kiujn la doktoro pasigis inter la partizanoj, ilia nombro dekobliĝis. Kiam Liverij Mikulicin en kunveno de la kaŝita stabo en Krestovozdvijensk diris la nombron de siaj fortoj, li ĉirkaŭ dekoble pligrandigis ilin. Nun ili atingis la menciitan nombron.


Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La domenisto

de Paulo Sérgio Viana



Mi bone memoras, kiam mi envenis tiun kafejon la unuan fojon, antaŭ kelkaj monatoj. Mi ĉirkaŭrigardis la ejon por serĉi tablon kaj mendi mian matenmanĝon, kaj mi vidis Fernandon sidanta ĉe fenestro, en la fundo de la ĉambro. Lia kalva, ronda kapo brilis sub la lumo de la mateno, kaj lia longa, pendanta nazo ŝajnis al mi iom komika. Li aspektis kiel iu, kiu atendas aliulon. Li havis antaŭ si etan tason da kafo kaj bluan plastan skatoleton. Li kun mieno de kontenteco rigardis al mi, kaj kvankam troviĝis pluraj tabloj liberaj, li laŭte invitis min:

– Amiko, bonvolu sidiĝi ĉe mi!

Dum momento, mi timis, ke mi ne memoras pri de longa tempo ne vidata konato, kaj mi rapide serĉis en mia memoro. Ne, mi ne konas tiun longnazan, pendorelan maljunulon, sed lia invito iel sonis al mi nerezistebla, kaj se eventuale li proponos interesan babiladon, eble estus oportune ne engluti mian mantenmanĝon maĉante miajn zorgoplenajn pensojn, tute sola. Mi decidis riski. Mi mendis mian manĝon de servisto kaj sidiĝis ĉe la nekonato.

– Bonan matenon. Bela vetero, ĉu?

– Bonan. Mia nomo estas Fernando. Mi ne volas perdigi al vi tempon. Mi ne ĝenos vin per teda interparolo kun stulta maljunululo. Mi estas okdekunujara, kaj almenaŭ tion mi ankoraŭ ne forgesis, ke maljunuloj estas preskaŭ ĉiam enuigaj homoj. Mi vokis vin por eta peto. Ĉu vi bonvolus ludi ununuran partion de domeno kun mi? Tio kostos al vi nur kelkajn minutojn, dum kiuj vi povos senĝene manĝi vian matenmanĝon.

– Interesa propono. Ĉu vi kutimas inviti nekonatajn homojn por tio?

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La inundo

de Julian Modest



Andrej kaj Katja venis en la vilaon je la kvina posttagmeze. La junia suno ankoraŭ forte brilis, kaj la rivero malrapide kaj enue lulis sin kiel maljunulino, laca kaj elĉerpita de la somera varmo. Andrej parkis la aŭton ĉe la vojo, prenis la sakojn, kaj kun Katja trapasis la riveron tra la ligna ponteto.

La vilao estis sur negranda insulo, meze de la rivero kaj Andrej tre fieris pro tiu ĉi pitoreska loko. Lia patro, kiu konstruis ĉi tie la vilaon, en la korto plantis fragojn, frambojn, pomajn kaj pirajn arbojn.

Antaŭ jaroj Andrej kaj Katja ofte venis ĉi tien, sed dum la lastaj monatoj ili preskaŭ forgesis la vilaon. La laboro kaj oficaĵaj problemoj estis multaj. Jam dum duona jaro Andrej kvazaŭ rampis sur la fundo de kota marĉo, el kiu li ne povis elnaĝi. Li estis esplorjuĝisto, kaj okaze de iu juĝproceso li kontraŭstaris al sia ĉefo. De tiam trankvilan tagon Andrej ne havis. La ĉefo komencis amasigi al li juĝprocesojn, esperante kaŝe, ke Andrej ne sukcesos solvi ilin kaj forlasos la oficon. Andrej tamen decidis ne rezigni. Frumatene li iris en la laborejon kaj eliris vespere la lasta. Li ŝatis sian laboron kaj ne deziris abdiki. Fojfoje laca kaj streĉita Andrej demandis sin: ĉu estas senco? Eble, meditis Andrej, antaŭ monato li devis eviti la intervjuon, kiun petis de li ĵurnalistino, sed tiam Andrej estis konvinkita, ke respondante al la demandoj, li helpos pri la justa solvo de unu el la plej grandaj kaj skandalaj procesoj. Tamen ĝuste tiu ĉi intervjuo kolerigis la ĉefon Vaklinov, kaj de tiam li kaj Andrej ne povis rigardi unu la alian. La malagrabraĵoj de la laborejo transiris al la familio kaj kiel serpentoj, varmigitaj de la printempa suno, ili elrampis el sub la ŝtonoj kaj venenis la familian vivon de Andrej kaj Katja.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tri jardekoj da libroproduktado

Enkonduko. Ne legu ĝin, se vi delonge abonas

Ekde sia renaskiĝo *La Ondo de Esperanto* ĉiujare publikigas statistikon de la libroproduktado en Esperantujo, daŭrigante la iniciaton de Vilmos Benczik en la revuo *Hungara Vivo*. Por tiuj, kiuj unuafoje abonas *La Ondon*, ni ripetu kelkajn enkondukajn frazojn, kiujn prefere ne legu niaj konstantaj abonantoj.

La bazo de nia statistiko estas la rubriko “Laste aperis” en la revuo *Esperanto*, en kiu estas registrataj ĉiuj surpapere aperintaj libroj, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro. La jartabelojn akompanas resumaj tabeloj por la 30-jara periodo de nia statistikado (1991-2020).

Tia statistiko ja estas kritikebla kaj kritikinda.

Unue, en “Laste Aperis” estas registrataj pluraj libroj, eldonitaj antaŭ kelkaj jaroj sed ekvenditaj de UEA en la koncerna jaro, ekzemple, ĉar la eldoninto ne tuj post la eldono sendis specimenon al Roterdamo. Tio povas doni misan bildon pri la revuata jaro, sed la resuma statistiko glatigas la fluktuation kaj fidinde vidigas la ĉefajn tendencojn en nia eldonado.

Due, la libroservo de UEA vendas ne ĉiujn novajn Esperanto-librojn, kaj en “Laste Aperis” kutime mankas, ekzemple, lerniloj eldonitaj por landaj bezonoj (ekzemple, lernolibroj por ĉinoj) kaj etkvante eldonitaj broŝuroj, kiujn la aŭtoroj disvendas kaj disdonacas en siaj kluboj kaj renkontiĝoj. Same mankas en “Laste Aperis” kongreslibroj, programbroŝuroj kaj jarlibroj, kiuj abunde aperas ne por vendado en libroservoj, sed por disdono al la respektivaj kongresanoj kaj asocioj.

Trie, ekster la statistiko restas la bitlibroj, kiujn la aŭtoroj (kutime, senpage) ofertas en la virtuala mondo sen zorgi pri papera eldono por ne pagi la eldonkostojn. Tio reduktas la rikolton de libroj paperaj.

Sed dume mankas pli granda statistika bazo ol la kritikebla “Laste Aperis”.

La plej malgrasa jaro. Ĉu nur pro la pandemio?

Jaro	Libroj	Paĝoj	Jaro	Libroj	Paĝoj
1991	222	26.091	2006	204	30.078
1992	205	25.789	2007	184	31.183
1993	136	18.511	2008	158	25.381
1994	188	22.078	2009	158	24.272
1995	200	23.345	2010	204	28.232
1996	232	28.637	2011	172	19.775
1997	273	27.727	2012	153	23.144
1998	208	28.769	2013	178	25.344
1999	208	24.460	2014	107	14.024
2000	235	25.869	2015	172	25.629

2001	222	31.520	2016	189	32.323
2002	174	26.451	2017	139	23.353
2003	224	28.424	2018	127	19.483
2004	183	27.295	2019	150	28.194
2005	159	23.780	2020	78	16.906

Dum la lasta jardeko de la 20a jarcento averaĝe aperis 210 libroj jare, dum la unua jardeko de la 21a jarcento la averaĝo estis 191 libroj, kaj en la jardeko 2011-20 – nur 146 libroj jare.

Laŭ “Laste Aperis” en 2020 surmerkatiĝis **nur 78 libroj** kun 16.906 paĝoj, la plej malgranda volumokvanto dum la 30-jara periodo. Nature, la eldonado falis dum la pandemio, kiu komplikis la internacian komercon, sed ŝajnas, ke la butikoj de UEA iĝis malpli aktiva ankaŭ pro la reduktado de la labortempo de la baldaŭ pensiigonta libroservisto. Oni flustras, ke la libroservo baldaŭ forlasos Roterdamon.

La ĝenerala distribuado montras, ke nun aperas proporcie malpli multaj lerniloj ol fine de la 20a jarcento, kaj ke danke al MAS ni disponas pri multaj politikajtoj.

La Lutermana epoko daŭras

En 11 el la 13 lastaj jaroj la plej aktiva Esperanto-eldonejo estis MAS (Monda Asembleo Socia), prizorgata de Vilhelmo Lutermano, kiu eldonas plejparte politikajn kaj sociajn verkojn de maldekstraj aŭtoroj, foje ankaŭ beletron. Post la faŭto en 2019, MAS denove estas plej supre kun granda distanco de la sekva eldonejo.

	1991-2000	2001-2010	2011-2020	2020	1991-2020 Sume aŭ averaĝe
Nombro de libroj en/pri Eo	2107	1913	1465	78	5485
Suma paĝonombro	251.276	276.616	228.165	16.906	756.057
Averaĝa paĝonombro de 1 libro	120,3	145,2	155,7	216,7	137,8
Averaĝa prezo de 1 libro (eŭroj)	8,20	11,40	12,1	14,07	10,38
Lernolibroj, vortaroj k. s. pri Eo	296	307	172	5	775
Originala beletro	258	214	213	19	685
Traduka beletro	458	361	330	19	1149
Lingvistiko, esperantologio	229	211	174	5	614
Eo: historio, kulturo, movado k. s.	241	299	173	3	713
Politiko, historio, filozofio, socio	166	228	248	24	642
Scienco kaj tekniko	182	93	33	3	308
Religio	105	93	72	0	270
Aliaj temoj	172	107	50	0	329

2020. Libroj		2020. Paĝoj	
MAS (Francio)	25	MAS	5305
Ars Libri (Pollando)	7	FEL	1874
Mondial (Usono)	7	Ars Libri	1673
FEL (Belgio)	5	E. Macko	1447
BES (Pollando)	5	Mondial	1384
Libro-Mondo (Pollando)	5	SAT (Francio)	1334
Horizonto (Japanio)	4	BES	1062
Libera (Belgio)	4	Libro-Mondo	1062
KAVA-PECH (Ĉeĥio)	3	Esprima.com.br (Brazilo)	962
E. Macko (Hungario)	3	Libera	554

Okaze de komuna eldono, estas konsiderataj ĉiuj kuneldonintaj eldonejoj/landoj; ĉi-jare pro tiaj eldonaĵoj en la listo estas tri eldonejoj el Pollando. Unuafoje en nia statistiko aperis Eugen Macko, kiu eldonis tri volumojn de la historio de Hungario de István Nemere, kiun tiu verkis hungare.

Antaŭ tri jaroj MAS rompis la unualokecon de UEA en la resuma librolisto kaj de FEL en la resuma paĝolisto. Ne estas verŝajne, ke laŭ la titolkvanto MAS estos superita en la proksimaj jaroj. UEA, *Fonto* kaj *Sezonoj* neniom eldonis en 2020.

1991-2020. Libroj		1991-2020. Paĝoj	
MAS	217	MAS	32.181
UEA (Nederlando)	167	Mondial	29.585
Libro-Mondo	162	FEL	26.416
Mondial	141	Fonto	23.468
Fonto (Brazilo)	140	Libro-Mondo	22.803
FEL	139	UEA	20.932
Impeto (Ruslando)	124	KAVA-PECH	19.440
Edition Iltis (Germanio)	116	Impeto	18.978
KAVA-PECH	112	Sezonoj	14.586
Sezonoj (Ruslando)	88	AEP (Svislando)	12.789

Francio eldonas plej multe

La 12an fojon dum la lastaj 13 jaroj plej multajn librojn en/pri Esperanto oni eldonas en Francio.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Omaĝe al Federico García Lorca kaj al Fernando de Diego

de Miguel Fernández



Ĉi-jare la literatura mondo honoras la memoron pri la universala andaluzo Federico García Lorca, murdita de hispanaj faŝistoj antaŭ 85 jaroj. Sed en la beletra Esperantujo, plie, honorindas la memoro pri la hispana tradukmajstro Fernando de Diego, kies superba esperantigo *Cigana Romancaro* de la fama Lorca-a poemaro *Romancero gitano* vidis la lumon antaŭ 50 jaroj, en publikigo de la jam preskaŭ mita eldonejo *Stafeto*, iniciatita de la same memorinda hispana esperantisto Juan Régulo Pérez.

Federico García Lorca (1898-1936) estas sendube la plej universala hispana verkisto, post Cervanto. Genia poeto, dramaturgo, pianisto, desegnisto... kun eksterordinare magna personeco. En liaj elplumaĵoj, elementoj folkloraj kaj popularaj tiel harmonie intermiksiĝas kun tradiciaj kaj novaj surrealismecaj formoj, ke lia verkaro estas unu el la plej profundaj kaj originalaj el la hispana kaj tutmonda literaturoj de la 20a jarcento. En 1936, faŝistaj kugloj metis finon al lia vivo, sed ne al liaj poemoj kaj teatraĵoj, kiuj tutmonde ĉiam pli vekas la intereson kaj la entuziasmon de fakuloj kaj komunaj legantoj.

En Esperanto, legeblas jenaj verkoj de ĉi aŭtoro: la poem-antologio de Federico García Lorca *Liriko* en traduko de Konstantin Gusev, publikigita de Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj (Moskvo, 1968, 80 paĝoj); la poemaro *Cigana Romancaro* en traduko kaj kun enkonduko de Fernando de Diego kaj kun antaŭparolo de William Auld (La Laguna: Stafeto, 1971, 110 paĝoj); la teatraĵoj *Sanga nupto* kaj *La domo de Bernarda Alba* en traduko de Miguel Fernández, en unu sola volumo №23 de la serio "Oriente-Okcidento" (Madrid: Madruda Esperanto-Liceo, La Misma, 1987, 229 paĝoj); diversaj poemoj en la antologio de hispanlingva poezio kontestema, engaĝiginta, socia kaj revolucia *Poezio: armilo ŝargita per futuro* en traduko de Miguel Fernández (Madrid: SATeH, 2013, 363 paĝoj). Krome, pri ĉi verkisto legeblas la esearo de Miguel Fernández *Sur la spuroj de Federico García Lorca* (Santiago: Universidade de Santiago de Compostela, 1996, 117 paĝoj).

Honoras la Esperanto-literaturon kaj, kompreneble, min mem la fakto, ke ĉi lasta verko miapluma kune kun la dediega *Cigana Romancaro* aperas kiel ĉefaj fontoj uzitaj en la libro *Sígaunaljóð*, traduko de *Romancero gitano* en la islandan lingvon, publikigita en 2005. Krome, ĝuste en unu el la eseoj, *Pri “Cigana Romancaro”*, konsistigantaj *Sur la spuroj de Federico García Lorca* mi pritraktas diversajn aspektojn de la originala Lorca-a poemkolekto *Romancero gitano* kaj de ties superba esperantigo far mia majstro Fernando de Diego. Jen, mallongigita kaj adaptita al ĉi kadro, la eseo *Pri “Cigana Romancaro”*:

“Tamen, ŝajnas al mi, ke traduki el unu lingvo en alian (se oni esceptas la suverenajn lingvojn grekan kaj latinan), similas rigardi la renverson de flandra tapiŝo, ĉar, kvankam la figuroj ankaŭ tie videblas, ili ne montras la glaton kaj brilon de la ĉefa flanko, ĉar duonkaŝitaj de la fadenoj. Kaj traduki el facilaj lingvoj ne implicas la posedon de pli da talento aŭ da stilo ol necesas por kopii ion el unu papero en alian. Nu, mi ne volas diri, ke la tradukarto estas ne laŭdinda: efektive, oni povus okupi sin per aliaj pli mavaj kaj malpli profitaj aferoj”.

Tiele argumentas Donkiĥoto – en traduko far Fernando de Diego – en la ĉapitro LXII de la senmorta verko de Cervantes. Ĉu satire kontraŭ tradukarto? Ho, se li povintus gustumi la ĉi-supran transskribon de liaj priaj starpunktoj! Sed ni aŭskultu lin plue:

“El ĉi rimarko mi esceptas du famajn tradukistojn: doktoron Cristóbal de Figueroa, pro ties *Paŝtisto Fido*, kaj don Juan de Jáuregui pro ties *Aminta*, ĉar ĉe tiaj versoj oni dubas, ĉu temas pri tradukoj aŭ pri originaloj”.

Jen la hiko¹. Skurĝo kontraŭ fuŝaj tradukantoj, ja ne malraraj –ve!– ĉiulingve kaj ĉiuepoke, kaj laŭroj al la Figueroa-oj kaj Jáuregui-oj, kapablaj elalĥemii artaĵojn el artaĵoj. Kiel saĝis la genia “frenezulo”! Bedaŭrindas nur, ke li ne havis la eblon frandi transponojn kiel *La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha* mem. Aŭ kiel *Doña Bárbara*, *La familia de Pascual Duarte*, *Cent jaroj da soleco*, *Tirano Banderas*... Aŭ kiel *Kun sopira koro* kaj *Sentempa simfonio*. Aŭ kiel *La lando de Alvargonzález* kaj *Cigana Romancaro*... Se male, li certe menciintus la nomon de ankoraŭ tria magiisto pri traduk-arto: Fernando de Diego.



Fernando de Diego

Pri F. de Diego nur entuziasme mi povas paroli. Tiom da harmonio fontas el lia plumo! Plumo aŭ sorĉa vergo, ĉe kies svingoj eĉ ĉio plej kompleksa ŝajnas transiĝi en ion gapige simplan. Svingoj laŭaj al la takto de la aŭtoraj korbatoj. Poezio kun majusklo. Arto, arto, arto...

Sed ni venu al la ŝpruco de tia entuziasmo. Al la epoko tuj posta al mia esperantistiĝo. La sciigo pri la ekzisto de Lorca-aĵoj en la ĵus alirita lingvo ne tro tiklis mian intereson. Mi skeptikis. Ne tiom pri la esprima potencialo de Esperanto, kiom pri la esperantigeblo de, ĝuste, la Lorca-a poezio, esence tiel universala sed akcidente tiel loka. Iu instigis min al konatiĝo kun *Cigana romancaro*. Fine mi cedis. Unue mi turnis min al la *Romanco pri la hispana Civilgvardio*, serĉante la redonon de la neredoneblaj versoj:


*Cuando llegaba la noche,
noche que noche nochera...*

Kaj mi eksaltis el mia haŭto antaŭ la tute neatendita solvo:

*En la falo de la nokto,
nokto nokte nokt-intima...*

Brave! Ronde perfekte! Ene de mi, la lirika papilio de la Granada bardo flirtis, lia voĉo resonancis. Montriĝis pleje prava la aserto far la hispana erudiciulo M. Menéndez Pelayo, ke “ne tradukeblas la sono de la silaboj, sed tradukeblas ties vibrado en la animo”. Eĉ pli, en la dediĝa propono ankaŭ strukture – kaj preskaŭ sonore – reproduktiĝas la sugestio de la originalo: aliteracioj, anaforoj kaj vortludo ĉirkaŭ la elemento *noche* [nokto]. La derivaĵo *nochera*, semantike sensenca, posedas tamen – kiel ĉio ĉe Lorca – fortan afekcian ŝarĝon sur bazoj kaj klera kaj popola. Tiele, per la vortoj *piragua* [pirogo], *monte* [monto] kaj *agua* [akvo], la granda hispana poeto kaj dramaturgo Lope de Vega (1562-1635) jene ĵonglis:

*Piraguamonte, piragua,
piragua, jevizarizagua.*



Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Metioj kaj krestomatioj

Baza literatura krestomatio, de Aleksander Korĵenkov k.a. (komp. kaj red.), 4a eldono, korektita kaj kompletigita, Sezonoj/Litova Esperanto-Asocio, Kaliningrado/Kaunas, 2019, 368 p., ISBN 9786099508771.

En epoko interreta, vi povas per rapida reta serĉo malkovri la identecon de tiuj “k.a.” apud la nomo de Korĵenkov. Same facile vi trovos recenzojn kiuj varme rekomendas aĉeti la libron. Se vi estas kursano aŭ ekzameniĝonto, ili rekomendas – kaj mi plene konsentas – ke vi ĝin nepre trastudu por bone trempi vin en la minimuma kvanto da tekstoj beletraj el diversaj epokoj. Ĉu tamen **mi** havas moralan rajton rekomende prediki pri tiu ĉi krestomatio?

Endas konfesi ke la unuan eldonon de la antologio pogrande vendis al la klientaj landaj asocioj neniu alia ol mi, kiu ĝuste en 1980 volontule deĵoris en la libroservo de UEA. Mi regule desupris kaj alsupris laŭ la spirala ŝtuparo portante enmane stakojn da *Gvidlibro por supera ekzameno* aŭ *Baza literatura krestomatio*. Konstatinte ke la libroj furoras, mi tralegis la gvidlibron. Sed la krestomatio estis defio por la rigidaj kategorioj tiam regantaj mian guston. Mi trovis la verkon nek sufiĉe pedagogia (kiel la *Gvidlibro*) nek sufiĉe beletra (kiel la *Esperanta antologio*). En tiu momento mia psiko, krome, estis lumjarojn for de ĉio ekzamena kaj kursa: ĵusa doktoriĝinto, mi plenkulme spiradis la liberan aeron, kvazaŭ elveninta el karcero. Ĉu vi pensas, do, ke post kvar jardekoj en la pedagogia metio nun, fine, mi opinias ke mi staras sur firma grundo kiu rajtigus min taksi tiun krestomation?

Malpli metie, pli pasie

Vi miskomprenas. Mian profesoran metion mi ja ne svingas kiel bazon de aŭtoritato. Tute male, en ĉi tiu eseo mi pledas kontraŭ la metio instrua, por la pasio lerna. Mi pledas, alie dirite, por transiro de la instrua vidpunkto al la memvole-lerna.

Fari tian pledon rajtigas la krestomatiitaj aŭtoroj mem. Ekzemple, kiam Emba (Imre Baranyai), en la poemo *Mi*, diras: “Mi volas esti homo nura,/ libera de la rudimentoj,/ en kiu brulas flame pura/ fratamo al la homaj gentoj” (p. 129), li gestas al tio ke la instrusistemoj estas komplikaj, en ĉiu lando, kun tradicioj de naciopa militemo. Tiu komplaceco evidentas jam sur la “rudimenta” nivelo, lernejkomenca, sed daŭras ĝis la tegmenta nivelo, la universitata. Vi certe scias ke oni nun dediĉas multe da fortostreĉo al la eliminado de la amatoreco el niaj vicoj, al tio kion oni amas nomi la profesieco. Tiu klopodo plibonigas nian funkciadon, kiel konate, sed samtempe kunportas riskojn, aspekto malpli rimarkata. Ju pli oni profesiigas la esperantistajn instruistojn kaj similigas ilin al la nacie trejnitaj profesoroj, des pli niaj iniciatoj sub la virta etikedo Universitata Agado igas ankaŭ nin iugrade komplikaj kun la sama fundamenta premisaro de universala militemo. Kion ni faru por atenti pri tiuj riskoj sen perdi la progreson jam faritan de niaj malamatoroj?

Mi dirus ke ni klare alfrontu unu fundamentan demandon, nome: ĉu ni esperantistoj efektive celas refasoni la dialogadon kiel spacon en kiu eblos serioze konstrui kunlaboran etoson, interpopolan amikecon, senbaran interkomprenon kaj pacan mondon? Se tiaj vere estas la celoj, tiam ni devas sisteme kaj senlace direktadi skeptikon al la instrua metio kaj al ĝiaj ŝatataj mobilizkutimoj kiujn ni trovas tiom konvenaj.

Kaj? Kaj, anstataŭ la metion de instruita fakularo, ni emfazu la pasion de la konema unuopulo kiu perlernas novan identecon kiel unuopa mondano. La lernema unuopulo prioritare kultivas sian mondanan individuecon. Tia individuo nur duavice plenumas la praktikan devon aparteni al specifa nacio kaj traŝtupi ties kutiman pedagogion – sed ne plene akceptas ĝin. Se vi volas kompreni kial mi diras ke estas malprudente de profesiegemaj esperantistoj ĉiutrajte imiti la metodojn de la naciaj universitataj pedagogioj, eble vi konsentos unue iom detale pripensi kun mi pri la pli elementa demando ĵus tuŝita. Nome, kial do memkonscia mondano havas la principan devon ne plene akcepti la kutiman pedagogion de sia nacio?

Naciaj pedagogioj - misa modelo

Serioza mondano konscias pri la ĉeesto de veneno ene de ĉiu nacia pedagogio. Temas pri venena diskriminaciemo, prezentata kiel tradicia kaj evidenta devo diskriminacii, kontraŭ diverstipaj “aliuloj” (jen alilandanoj, jen virinoj, jen enlandaj malplimultanoj). Plene akcepti nacian pedagogion signifus volonte trinki mem tiun venenon kaj trinkigi ĝin al aliaj. Estas la devo de ĉiu mondano laŭpove agi kontraŭ la venena flanko de sia nacia pedagogio. Ne nepre oni senescepte klopodu heroe martiriĝi, kompreneble. Efike rezisti socian venenon signifas pacience trovi kaj apliki la loke-tempe plej taŭgajn metodojn por malhelpi ĝian transdoniĝon tra la generacioj. Heroaj martiriĝoj nutras la operojn, sed malofte sukcesas ŝanĝi la socikulturajn agordojn. La strebado estas eduka; kaj oni devas unuavice klerigi sin mem.

Probal – diros mia kritikanto – vi denove gurdas vian kaĉon. Kiu diris al vi ke ene de ĉiu lando ne ekzistas jam tute pretaj sociaj movadoj? Ke mankas rimedoj kaj strategioj? Ke la homoj ne scipovas jam propraforte kaj en la propraj lingvoj batali por sendiskriminacia socia etoso kaj por forigi la venenon pri kiu vi elokventas? Precize kian specifan utilon de Esperanto vi volas krisigni? Se tion vi ne diros klare kaj nemaltrafeble, kial en la nomo de ĉiuj demonoj vi verkas en tiu ĉi almanako pri la temo, anstataŭ daŭrigi vian bengallingvan predikadon al via propra publiko?

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eblas aplaŭdi dumane

Johansson, Sten. *Sesdek ok: Originala romano.* – Novjorko: Mondial, 2020. – 185 p.

Johansson, Sten. *Ne eblas aplaŭdi unumane: Originala romano.* – Novjorko: Mondial, 2019. – 161 p.

Jam tro longe mi ne tro atentis la literaturon en Esperanto. Iel mi havis nek tempon nek pacon por sidi kviete “en angulo kun libro” kiel iam Thomas à Kempis. Nun tamen iu pandemio kaj aliaj cirkonstancoj donis al mi pli ol sufiĉe da tempo por denove ekĝui nian beletron, ja du romanoj de Sten Johansson aperis en mia poŝtkesto, unu historia kaj unu samtempa. Do bela okazo por gustumi la literaturon en Esperanto.

Sten Johansson, ricevinto de Premio Grabowski, apenaŭ bezonas apartan laŭdon. Certe ĉiu parolanto de Esperanto, kiu kapablas legi, iam dum sia lingva kariero plezure legis almenaŭ fragmentojn de liaj verkoj, ĉu facillingvaj, ĉu normallingvaj.

Sesdek ok

Libro, kiu priskribas eventojn de la 1968-a jaro estas por multaj legantoj jam historia romano. Por ili kaj ankaŭ por tiuj, kiuj havas memoron de tiu tempo, Sten rekreas la etoson de tiuj jaroj. Li rakontas el perspektivo de okcidentulo. Björn. La mi-rakontanto de *Sesdek ok* havas intereson pri lingvoj kaj kulturoj. Dum kongreso de SAT en la sudsveda urbo Malmö il amikiĝas kun Dani, ĉarma, senzorga, sed ankaŭ iomete naŭva franca knabino. Kiam Björn ricevas la okazon daŭrigi siajn studojn en Parizo, li denove konatiĝas kun Dani. Dume lia sveda amikino plu studas en alia sveda urbo, kie ŝi politike radikaliĝas en maŭista politika sekto kaj klopodas komplete distanciĝu de la socio.

La plej granda parto de la romano temas pri la travivaĵoj de Björn en Parizo, lia sperto pri la urbo kaj pri la homoj tie. La instrumentoj de la profesoroj apenaŭ tuŝas la bezonojn de tiamaj studentoj – la intelektuloj postulas drastajn ŝanĝojn en la socio. Nur foje Björn vizitas Esperanto-klubon, kies gvidanto ŝajne estas iom fremda en la mondo. La plej proksiman kontakton al francoj li havas per la renovigita amikeco kun Dani. La plej grava evento estas la ribelo de la studentoj en Parizo, la majo de 1968, kaj la longa striko poste. Ni konatiĝas kun malsamaj politikaj orientiĝoj. Sed ĉiam Björn restas observanto, ne tro malsimpatia, sed neniam aktiva. La plej granda parto de la libro tamen estas priskribo de ĉiutaga vivo.

Sten Johansson kapablas kun malmulte da vortoj krei simpatiajn personojn, aŭ pli bone: la personoj kreas sin mem per siaj vortoj. Plej ofte ilia vivo estas malplena je eventoj, sed Sten fidus, ke liaj personoj estas sufiĉe fortaj, ke ili havas ion



interesan por diri al ni. Samtempe li aldonas sufiĉe da spico por daŭre teni la atenton de la leganto. (Ĉu ni iam malkovros la sekreton de Dani?) Björn skribas sian rakonton kiel leteron al sia sveda amikino. Jen kiel li finas:

Mi klopodos skribi ĉion, kion mi memoras, se ne pro alia kialo, do almenaŭ por povi mem ĉion tralegi kaj rekonsideri.

Eble verkante tiun historion aŭ poste legante ĝin, mi komprenos ion plian pri tio, kiel mi agis, kion mi travivis, kaj kion rakontis vi.

Mi kredas ke mi bezonas verki ĉi tiun rakonton.

Se vi volos legi ĝin, do tre bone. Se ne, mi povos nenion plian fari.

Aliajn homojn ĝi certe ne interesos.

Jen li tamen eraras. Almenaŭ mi sekvis lian historion kun granda intereso. Sendube vi ankaŭ.

Ne eblas aplaŭdi unumane



En ĉi tiu verko Sten Johansson donas parolon al “enmigranto de la dua generacio”, do al iu, kies gepatroj naskiĝis en alia lando, sed kiu mem kreskis en la dua lando. Mehdi estas irandevena studento. Li aspektas “fremde” por multaj svedoj, sed li mem sentas sin svedo.

Laŭ la plej nova ideo de iuj maldekstremaj universitat-anaj loĝantoj de ebenturoj, estas grava peko de kultura alproprigi, se iu parolas kun alia voĉo ol sia propra. Laŭ ili Sten nur havus la rajton paroli propravoĉe, do kiel blanka, maljuna, aliseksema viro. Tiu teorio estas kompleta idiot-aĵo. Kompreneble kompetenta verkisto rajtas doni sian voĉon al kiu ajn, kaj Sten faras tion konvinke. Mehdi, do la protagonisto de tiu romano, priskribas siajn spertojn en la sveda socio, kiel skaniano kun sia tipa akĉento en la sveda ĉefurbo. Per liaj okuloj alilanda leganto kvazaŭ ricevas enkondukon al variaj aspektoj de la sveda socio. Okazas tio, ke oftas en romanoj: Mehdi enamiĝas en Frida. Ŝi estas knabino de la nordo de Svedio. Tiu “nordlando” estas por svedoj “de la sudo” iu fora pejzaĝo. Frida kaj Mehdi translokiĝas norden, kaj tie Mehdi esploras novan kulturen terenon, ekzemple, la fifamajn svedajn haringojn:

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Io devas okazi

Korotkov, Miĥail Gavriloviĉ. *Io devas okazi: Rakontoj, fabeloj, pripensoj / Postparolo de Aleksander Korĵenkov. – Kaliningrado: Sezonoj, 2020. – 117 pagoj. – (Literatura suplemento al La Ondo de Esperanto, 2020).*



Pri kelkaj libroj, ekzemple, krimromanoj, oni ŝatas diri, ke oni ilin legas unuglute, ke oni ne povas ilin lasi antaŭ ol atingi la finon. Pri ĉi tiu mi dirus same, sed pro tute mala kaŭzo: la verko konsistas el dek ok mallongaj noveletoj (parte jam aperintaj aliloke), do oni povas interrompi la legadon post ajna deko da minutoj, ĉar la unuopa rakontofadeno konkludiĝis. Sed ja ne: kiam oni finis unueron, jen humuran, jen fantastan, jen kortuŝan, jen, jes ja, ankaŭ tute normale senekscitan, oni pensas: “mi legu ankaŭ la postan, ĝi certe plaĉos al mi kiel la antaŭaj”.

Fakte ni renkontiĝas, en ĉi tiu Suplemento, kun Miĥail Korotkov, rusa-ukraina siberiano, elstara rakonta personeco, gajninto de pluraj premioj, malmulte partopreninta en la tiel nomata oficiala Esperanto-movado. Klerulo, multlingvulo (dekojn da lingvoj li mastras diversnivele laŭ verkado kaj tradukado), li trairis plurajn metiojn, ĉar la ŝanĝo de la socia sistemo en Sovetunio, poste Ruslando, kaŭzis malfacilaĵojn eĉ je bazaj vivelementoj kaj postulis adaptiĝon ankaŭ de la pensoj, kaj tio al verkisto ne estas facila: “La vivo por la honestaj homoj iĝis pli ol peniga” diras la postparolo de Aleksandr Korĵenkov.

Se oni aŭdacus detekti ĝeneralan aliron al la vivo el la eroj de ĉi tiu libro, mi dirus, ke la aŭtoro ne fidas, eĉ spitas al politikistoj diversperiodaj kaj same al religiuloj, kaj ke ankaŭ la ĉirkaŭa homaro ne estas invita: drinkado estas konstanta gvidmotivo de liaj rakontoj, estas ĉiam iu ebrulo (“Li haste krucosignis sin per la liva mano, ĉar en la dekstra li havis glason”), kiam du renkontiĝas kaj komencas interparoli, tuj vodko, eĉ ne nepre bonkvalita, kaj zakusko akompanas la babiladon. “Nu, kial vi ĉiam drinkadas kaj vagadas kiel peniso en larĝa pantalono?” Same, violento aspektas io nature kunnaskita kun la homa karaktero: jen murdo minacata, sed eĉ reala, per pugnobatoj, jen trampo kiu pasigis tempon en karcero, jen perforta reago al tute naiva frazo.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Beletra Almanako, 2020, №39 (Oktobro)

En sia prezento de la oktobra BA Anina Stecay rezonas, ĉu sekvado al sukcesaj verkaj strukturoj, uzado de reguloj lernitaj en fakaj kursoj ebligas krei novajn kaj interesajn verkojn.

Originala prozo venas de Anina Stecay, Francisco Javier Moleón kaj Trevor Steele. El la romano *Sesdek ok* de Sten Johansson estas publikigita komenca ĉapitro. Osmo Buller per beletraj tombovizitoj rakontas pri kelkaj finnlandaj Esperanto-verkistoj kaj lian rakonton sekvas represo de du prozaĵoj de Martti Putaala. Poezion kontribuas Jorge Camacho kaj Jesper Lykke Jacobsen.

Riĉas sekcio de tradukita prozo. El Epikuro tradukis Nicola Ruggiero, el Kurt Tucholsky – Trevor Steele. La novelo *La edzino de lia juneco* de la afrik-usona (jes, tiel en la politike korekta lingvaĵo!) verkisto Charles W. Chesnutt (tradukis Barry Friedman) estas aperigata “por turni la atenton de aliregionaj legantoj al parto de la pirasa sperto de Usono kiu ne ricevis adekvatan internacian diskonigon”.

Faskon da etaj rakontoj de la rusa kaj sovetia verkisto Daniil Ĥarms proponas Stanislavo Belov. Paradoksaj, ironiaj kaj absurdaj estas rakontoj, anekdotoj kaj aforismoj de Ĥarms, kies stilon imitas liaj sekvantoj kaj nemalmulton de ili verkitan oni atribuis al la plumo de Ĥarms. Per la traduko de Nicola Ruggiero oni konatiĝas kun poemo de italino Gianfranca Gastaldi.

Yu Jianchao artikolas pri rezonadoj pri neologismoj inter Tibor Sekelj kaj Laŭlum, Sara Spanò intervjuas esperantan kaj hispanan kulturaganton Miguel Fernández. Nekrologe estas omaĝitaj Tacuo Huĝimoto kaj Eugène de Zilah, ankaŭ per fragmento el la romano *La princo ĉe la hunoj*.

Recenzas Jorge Camacho pri *La nigra fiŝeto* de Samad Behrangi; Probal Daŝgupto pri *Baza literatura krestomatio*, Valentin Melnikov pri *Amo inter ruinoj* de Trevor Steele. Federico Gobbo replikas al la recenzo de Wim Jansen en BA 38.

Halina Gorecka



Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Verda stelo kaj roza triangulo: Specifa antologio



Laŭ Giorgio Silfer, kunaŭtoro de *Historio de la esperanta literaturo*, naciaj antologioj en esperanto estas relative multaj kaj ofte bonaj, sed preskaŭ mankas specifaj antologioj. Per *Verda stelo kaj roza triangulo* li nun kolektis verkojn originalajn de samseksamaj kaj ambaŭseksamaj (sed ne nur) verkistoj en nia lingvo, esplorante la temaron en nia literaturo kaj kontribuante al la esperanta literaturkritiko ankaŭ per tia antologio.

Rezultos 120-paĝa libro kun prozo, poezio kaj teatro el dek du aŭtoroj: Kenelm Sturmer, Mason Stuttard, Lajos Tárkony, Nicolino Rossi, Ulrich Matthias, Benoît Philippe, Gerrit Berveling, Ulrich Becker, Etel Zavadlav, Giorgio Silfer, Suso Moinhos, Paulo Silas.

Laŭ la kolektanto, ofte temas pri tekstoj kie la seksa inklino nur diskretas: ekzemple *Apud stacidomo Victoria* de K. R. C. Sturmer; probable tial ĝi pasis nerimarkate de la intermilita socio, kaj eĉ poste, trovante lokon en *La tridek tri rakontoj* de Rossetti-Szilagy. La esplorado rezervas surprizojn.

Nur en la kvina periodo de nia literaturhistorio (1970-1993) la aŭtoroj manifestiĝis pli libere, kiel rimarkigis Herbert Mayer en sia recenzo pri *Sur la vivopado* (en *Literatura Foiro*, 1981, №69), libro kiun Giorgio Silfer mecenatis. Kaj nur en la nuna jarcento manifestiĝis en ĉi tiu kampo talenta verkistino, danke al novelo en la revuo *Femina*; sed Etel Zavadlav ne estas ankoraŭ nia Sapfo...

Ne uranisto decidis trakti ĉi tiun delikatan temaron: kial? Eble ĉar uranistoj ne sukcesis ĝin trakti, malgraŭ klopodo per la antologieto *Glaŭka Lum'*; la temo estas beletre tro grava kaj interesa por resti neglektita, aŭ plumpe prezentita. Cetere, Giorgio Silfer estas la sola aŭtoro kiu pritraktis uranisman en la esperanto-teatro, per sia dramo *La butiketo de la juvelisto* (2012).

La libro estas mendebla kun forta rabato (nur 10 eŭroj plus sendokosto) per la adreso lf-koop@esperantio.net ĝis la 14a de aprilo 2021. Poste la prezo estos 15 eŭroj. Distribuo ekde majo 2021.

HeKo

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Ĝoju! István Ertl revenas kun sia rubriko, kiun tiel ŝatis niaj legantoj, kaj kune kun li revenas ankaŭ la sekcio Mozaiko, en kiu bonvolu legi kuirrecepton el Pollando kaj ŝercojn el Ruslando. Viaj kontribuoj (ŝercoj, anekdotoj, krucenigmoj, karikaturaj k. s.) estas bonvenaj.

Pola paska babao



Proksimiĝas Pasko, kaj kun ĝi diversaj manĝaĵoj, kiuj tradicie okupas la printempajn tablojn en Pollando. De la infanaĝo, antaŭ ĉiuj du aromoj akompanas mian personon pri tiu festo: temas pri tiuj de kreno kaj kruda gista pasto.

Post salaĵoj, super kiuj regas la odoro de kreno – ovoj, kolbasoj, *żurek* (supo el fermentinta faruno), gelatenaĵoj kaj pasteĉoj, venas la tempo por frandaĵoj dolĉaj. Du el ili meritas precipian atenton.

La unua estas mazurko (pole *mazurek*; la saman nomon havas danco kaj muzikaĵo el Mazovio): buteran krustan pastaĵon oni ŝmiras per lakta aŭ alia kremaĵo aŭ konfitita fruktaĵo kaj dekoras per kanditaj fruktoj kaj nuksoj, kreante el ili verajn pentraĵojn, kiuj plej kutime prezentas florajn motivojn aŭ amentojn de saliko.

La dua estas la reĝino de la tablo, granda gist-pasta babao* (pole *baba* aŭ *babka*), ofte bakata en muldilo kun mufo – la kukon oni ofte uzas kiel siaspecan flolvazon, metante amentajn branĉojn en la kavon. Mi ŝatus kunhavigi kun vi recepton de ĉi tiu kuko, kiun de pluraj jaroj mi uzas – ĝi estas facila kaj mi garantias, ke via bakaĵo dum pluraj tagoj restos freŝa, plenigante la ĉambron per kontentiga odoro.

Ingrediencoj

(por 2 mezgrandaj babaoj kun la diametro de ĉ. 24 cm, eventuale 1 grandega babao)

- 60 g da freŝa aŭ 20 g da seka gisto
- 700 g da tritika faruno (plej fajna)
- 200 g da sukero
- 100 g da fandita butero

* Laŭ PIV, babao estas “spongeca kuko, ofte kun sekvinberoj, sorbigita per rumo” (la difino rilatas al *ruma babao*, franca kuko). Mi iom vastigis la signifon; en la pola la kuko nomiĝas *baba* kaj iom similas la francan kuzon. Foje la bakaĵon en Esperanto oni nomas per la germandevena vorto *kuglofo*.

- 500 ml da lakto
- 6 ovoflavoj
- kulereto da salo
- manpleno da sekvinberoj (prefere antaŭe trempu ilin en varmega akvo) kaj/aŭ kandita ŝelo de oranĝo, citrono k.a.
- raspita ŝelo de du-tri citronoj
- eventuale glazuro el 250 g da pulvorigita sukero miksitaj kun 3 kuleroj da akvo aŭ citronosuko

Recepto

1. Varmigu lakton (ĝi ne estu tro varmega por ne mortigi giston), aldonu duonon de sukero kaj giston. Miksu kaj flankenlasu por 10–20 minutoj, por ke gisto komencu fermenti.

2. En grandan bovlon metu farunon (rekomendindas ĝin unue kribri), ovoflavojn, la ceteron de sukero, raspitan citron-ŝelon, salon kaj la gistan-laktan fermentaĵon. Komencu knedi la paston.

3. Aldonu varman, likvan buteron (denove – atentu pri ĝia temperaturo). Daŭrigu la knedadon dum almenaŭ 20 minutoj, por ke ĉiuj ingrediencoj kuniĝu kaj la pasto estu aerita. Ĝi pretas, kiam la pasto komencas degluiĝi de la manoj kaj estas elasta.

4. Aldonu sekvinberojn, miksu ilin bone kun la pasto. Kovru la bovlon, lasu en varma loko por unu horo.

5. Prenu du mezgrandajn (prefere; diametro de ĉ. 24 cm) babao-muldilojn aŭ unu grandan (ĉ. 30 cm). Ŝmiru ene per butero aŭ oleo. Enmetu paston – gravas, ke ĝi plenigu ne pli ol 2/3 de la muldilo, ĉar la kuko ŝvelos. La muldilojn plenigitajn per pasto lasu en varma loko por 30-60 minutoj, por ke la babaoj ankoraŭ iom kresku.

6. Baku la babaojn dum ĉirkaŭ unu horo en la temperaturo 200°C.

7. La bakitajn kaj iom malvarmiĝintajn babaojn vi povas kovri per glazuro.

Przemysław Wierzbowski



Dekstre. — Adam Setkowicz: Pola knabino en popola vesto kun babao. (Paska poŝtkarto el Krakovo, 1936).

Ridu kune ni!

Propravole kaj kun kanto

Ruso, franco kaj usonano decidis aranĝi konkurson pri kiu plej bone manĝigos katon per mustardo.

Usonano kaptis la katon, forte premis ties makzelojn kaj enŝovis tien mustardon. La frostiĝinta je timego kato ĉion forglutis. “Ne”, – diris la ruso. “Tio estas perforto!”

Franco prenis pecon da pano, metis sur ĝin belan fiŝeton, supre ŝmiris ĝin per butero kaj inter ili metis mustardon. La kato manĝis la pladon, sen kompreni ion. “Ne”, – diris la ruso. – “Tio estas fraŭdo”.

Fine venis lia vico. La ruso prenis la katon kaj ŝmiris la mustardon sub la kata vosto. La kompatinda besto ekhurlis kaj lekis sian bruldoloran nutraĵon. “Atentu!” – fiere deklaris la ruso. – “Propravole kaj kun kanto!”

Strategia problemo

En malnova domo loĝis granda musaro – feliĉa kaj bonfarta. Sed iun tagon aperis grandega kato, kiu komencis kapti kaj manĝi ilin. Finfine la musoj decidis aranĝi kunvenon por trovi savovojn. Longe ili disputis, sed solvo mankis.

Tiam el malantaŭaj vicoj eksonis laca voĉo: “Musoj, aŭskultu min!” Ĉiuj disiĝis kaj antaŭen paŝis maljuna rato, apoganta sin sur bastoneton. Ĝi diris: “Mi scias kion fari. Necesas alkroĉi al la kato malgrandan sonorilon. Ni aŭdos ĝin alproksimiĝi kaj forkuros”.

Ĉiuj ekĝojis kaj komencis kaprioli kaj hurai. Nur post ioma tempo iu museto elbuŝigis sian dubon: “Mi havas etan demandon: kiel ni alkroĉos al la kato tiun sonorilon?”

“Ho!” – ekkriis la maljuna rato. – “Ne ĉagrenu min, musoj! Mi ja solvas strategiajn problemojn...”

Jen por gloro, jen por ignoro

Post sinko de ŝipo judo saviĝis en neloĝata insulo meze de oceano. Tamen li aranĝis tie sian vivon sufiĉe bone kaj, kiam post unu jaro venis ŝipo, ties pasaĝeroj ekvidis la kontentan judon surborde kaj tri sinagogojn en diversaj anguloj de la insulo.

“Sed por kio vi, unusola homo en tiu insulo, havas tri sinagogojn?!” – ili demandis. “Ho, ĉio estas tre simpla”, klarigis la judo. – “En unu sinagogon mi iradas ĉiutage, en la duan – nur sabate. Kaj en la trian – mi neniam faros eĉ unu paŝon!”

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Mola propagando

Dankegon pro disvatigi la informojn... (<https://www.vinilkosmo-mp3.com/eo/blogo/145-artista-solidareco.html>; rimarkis Russ Williams)

Kampadeja kapitalismo?

Leĝo de la tendeca falo de la profitkvoto (*Katalogo de la Libroservo de UEA*; <https://katalogo.uea.org/index.php?inf=9793>)

Ĉasista aktivulo

Derks predis por demokratiigo de UEA kaj en 2011 eldonis sian studon *Gvidilo por komitatanoj* (2011). (Johan Derks forpasis; <https://sezonoj.ru/2020/12/derks-2>)

Amput' el Sovetio

Mi dankas la ruĝan armeon, mi eĉ dankas Stalin pro gravege helpi *sennazigi* Eŭropon ("Hejmano", 12 dec 2020; <https://www.liberafolio.org/2020/11/30/albert-stalin-garrido-elektita-estrarano-de-tejo/#comment-5467>)

Porti ne stelon sed ĉapelon

...sinjoro Sütő estas senriproĉa el rasa vidpunkto, ne devas porti flavan ŝtelon. (Imre Kertész: *Sensorteco*. Trad. István Ertl, Novjorko: Mondial, 2018, p.18; trovis Brian Moon)

Ne krucu fiskon

...ankaŭ mian sennaciistan kaj senreligian estetikan guston ĝenus la vido de flago, Krucifisko aŭ hostio en nedigna loko... (Carlo Minnaja, 2 mar 2021, <https://www.liberafolio.org/2021/03/02/reta-serco-igis-delikto-kontrau-la-civito/#comment-5928>)

Tunojn da aliĝoj

Jam antaŭ la UK de Prago (1996) aperis la deziro, ke iuj pli bonstataj transprenu la ŝarĝon kaj fondu veran asocion, kiu per aliĝo al UEA povu enpezi kotizojn. (TADEN 25-jara // *Puraj Pulmoj*, 5 aŭg 2020)

Arbara higieno

... mi jam havis diskutojn kun homoj cervolavitaj fare de tiu propagando... (Hejmano, 20 jul 2020, <https://www.liberafolio.org/2020/07/18/la-sekva-ijk-okazos-en-ukrainio#comment-4554>)

Ekspresvoje al artrozo (Ĉu kreskas el la art' rozo?)

Progresas la medicina artro, sed la sanrisko restas serioza. (*Puraj Pulmoj*. 2020, №1, 3 maj 2020)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Anne Karin Bondhus, Morenefarett 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, аб. ящик 1205. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 122-paĝa marta *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>